31. La naturo estas ja belega, sed artistoj plibeligas ĝin. Aŭ: La naturo estas belega, malgraŭ tio artistoj ... Aŭ: La naturo estas tamen belega, sed ...

32. Ili vojaĝis en la tramo, per la tramo, trame (relegu 6!).

33. Ili sidigis sin en malgranda parko. (Ĉu ili ne restis sidi, post kiam ili eksidis? Ĉu ili tuj ekstaris kaj restis nesidantaj? Malprava estas la opinio, ke „eksidi“ postulas akuzativon; kie ili eksidis?)

34. En nia urbo oni malfermis (inaŭguris) muzeon (malfermiĝis ĉielo, roko kaj simile, sed la muzeon oni devis malfermi, iu devis tion fari; io alia estas: oni malfermiĝis).

35. La elefantoj faris bruon, kiam (pli bone ol se) iu volis trompi ilin (la elefantoj faris ekscesojn, spektaklon, kriegis, furiozis, sed ili ne povis fari skandalon, ĉar skandalo ne estas (kiel erare diras P. V.) la indigno pro maldecaĵo nek brua kaj kolera esprimo aŭ monstro pro la indigno, sed kontraŭe ĝi estas maldecaĵo mem vekanta indignon, malplaĉon, abomenon).

36. Pedagogoj devus komenci la instruadon ĉe (aŭ: al) la bestoj (ankaŭ tiu ĉi propozicio faris grandan konfuzon ĉe la legintoj, kiuj ne povis kompreni intencon de la aŭtoro; ni komprenis tiel: pedagogoj instruu antaŭe bestojn por havigi al si kapablon instrui infanojn; aliaj komprenis kontraŭe: pedagogoj estu antaŭe instruataj de bestoj por fariĝi kapablaj instrui la aliajn; jen konsekvencoj de tendenco al ironio; „instruado kun la bestoj“ estas netaŭga; „instruado pri bestoj“ ne estis certe intencata de la aŭtoro).

37. Felice tiuj ruinoj ne ekzistas plu (estis klara preskaŭ por ĉiuj).

38. En la koridoroj preĝis la monaĥinoj (same kiel ĉe 11 k. a.).

39. Studentoj vojaĝis per aŭtobuso (ne estas kaŭzo akcenti ĉu „en“ aŭ „sur“).

40. La arbojn prizorgis la laboristoj mem (komparu: 17a; „la laboristoj solaj“ estas alisenca).

41. Turkoj regis en la mezo de la lando (en la mezo, kiel en la lando, ne sur la mezo, sur la lando).

42. Edmondo marŝis trans (inter) montoj kaj valoj (ĉu oni povas marŝi tra montoj sen tuneloj?).

43. Junuloj kunvenis (amasiĝis) en la halo (estas vere, ke Zamenhof kantas „kolektiĝas paca batalantoj“, sed certe li ne estus dirinta „kolekto da batalantoj“, sed kunveno aŭ amaso; konsekvenco estas: homoj kunvenas, amasiĝas, arigiĝas, sed ne kolektiĝas).

44. Jen la viro de ordo ekparolis al li (la esprimo „la

viro de ordo“ por policano estas ĉie kutima kaj komprenebla, sekve eraris, kiu elstreke ĝin).

45. La vinberaro estis kara (multekosta), ĉar ankoraŭ ne venis la sezono de vinberaro.

46. La libro estis presita en la rusa lingvo (la libron oni devas presi, ĝi ne presiĝos; certe sufiĉas „rusa lingvo“, tamen oni ordinare uzas la artikolon).

47. En la familio li estis estro; aŭ: li estis familiestro (ĉiukaze estro kaj familiestro sen la artikolo; la vorton „familio“ oni ne bezonas ripeti).

48. Li estis kredema persono, li kredis ja eĉ nekredablajn historion. Aŭ: Li estis tiel kredema, ke li kredis eĉ...

49. Cigaringon li ne havis, li ne fumis ja; aŭ: ... ĉar li ne fumis.

50. Kiam ekmarŝis la morto, li ne ektimis; aŭ: ... li ne eksentis timon.

Oni vidas, ke la riproĉoj de legantoj al la aŭtoro estas neniam gravaj; li povas esti kontenta kaj certe li ne koleras nin kaj niajn legantojn. La leciono lumigis al la legantoj kelkajn punktojn de nia lingvo, tio estas utila rezultato por ĉiuj. Ni dankas al la partoprenintoj, inter kiuj krom la supre jam nomitaj sinjoroj estis ges-oj: Dek. P. Macek, Pulgary, ing. E. Tuháček, Olomouc, J. Zdvihal, Týnec S., M. Vadasová, Olomouc, J. Šlepička, Vodňany, L. Kučera, Roudnice L., J. Kubásková, Stankov, A. Přehnilová, Olomouc, S. Valešová, Turnov.

Fine ni atentigas la legantojn, ke en la dua enkonduka alineo (pĝ. 73) elfalis du vortoj dum kompostado; oni legu: ... ni citas propoziciojn, kiuj estas ne ĉiam perfektaj... En la lasta alineo (pĝ. 74) oni legu: ... ricevos libron kiel premion.

Aldono al s-ro J. H. el Ĉ. L.: Via riproĉo pro la propozicio „Vendrede vespere okazis la publika prelego en la kafejo G. kaj ĉeestis ĝin proksimume 200 personoj“ (pĝ. 70) estas malprava kaj via teksto ne estas pli, sed malpli bona: „Vendrede vespere okazis publika prelego en la kafejo G., kiun ĉeestis...“; „kiun“ rilatas al „kafejo“ sed ĝi devas rilati al „prelego“, en via teksto oni devus ripeti: kiun prelegon ĉeestis... Elizii = forigi la finan vokalon de vorto; elizii artikolon signifas: skribi kaj diri l' (kun apostrofo) anstataŭ la. Diri „prelego“ anstataŭ „la prelego“ ne estas elizio de la artikolo, sed simpla ellaso, forlaso, forigo. bh.

## LOKAJ INFORMOJ

**Baŭov.** — En nov. 1946 komencis nova kurso. Ĝi estis aranĝata de ŬRO, kies gvidanto estas tre favora al nia lingvo. Partoprenis 23 personoj, inter ili estro de skoltaj kaj kvin geinstruistoj de la burĝa kaj popola lernejoj. Oni instruis laŭ lernolibro de Kilian. Kurson gvidis fakinstruisto F. Omelka.

**Bratislava.** — Anna Alamo parolis la 16-an de junio kun tre bona sukceso. Post la prelego konkurenco okazis en kafejo Ŝtefania inter esperantistoj en regno de spritaĵoj. Laŭ „Esperantisto slovaka“ venkis nenomita samideano, enskribinta en ŝian memolibron sekvan versokvaron: „Al Svedujo? — Tre necesa la monujo! — Al Alamo? — Sufiĉas nur kora amo!“

**Brno.** — EK aranĝis la 25. 8. prelegon de Dro A. Baur el Bern en aŭditorio de medicina fakultato pri temo: Svislando. Dro Baur en komenco menciis la universalan kongreson de E. en Bern kaj poste parolis pri principoj de svisa demokratio k. neŭtraleco. Pri ĉiu lego, kiun ellaboras parlamento, decidis referendumo, ĝenerala popola balotado. Frunte de ŝtato staras 7membra kabineto, kiun prezidas alterne unu el la membroj, reprezentanta samtempe Svislandon, tie do ne estas nomo de prezidento tiel konata, kiel en aliaj landoj. Plimulto en Svislando ne subpremas malplimulton, ne diktas al ĝi, sed ĉiam klopodas pri interkonsento kaj kompromiso. Poste estis projekciitaj filmoj, kiuj konatigis la publikon kun naturbelaĵoj de Svislando kaj vivmaniero de ĝia loĝantaro. Ĉeestis 140 personoj, malgraŭ varma vetero, bonvenigis kaj enkondukis J. Vondroušek, bonege kaj pretece interpretis s-ano J. Kořinek. La prelego tre plaĉis kaj bone sukcesis. Al ŝatataj gastoj estis montrita Brno kaj grotoj ĉe Macocha, eĉ Bratislava, dank' al afableco de ges-roj

**Kořinkovi.** Pri la prelego raportis 2 ĵurnaloj. — Privata lernejo Ŭstav mod. řeči, kiu havas siajn filiojn en 43 lokoj, metis en programon de sia instruplano Esperanton. La klubo gratulis kaj zorgis pri diskonigo kaj disvastigo de la prospektoj.

**Bystřice pod Hostýnem.** — Malnova lulilo de Esperanto-movado inter ĉeĥoj. Post ambaŭ mondmilitoj la movado profunde dormis. Sed kiam venis la printempo 1947, ĝi komencis maldormiĝi. Oni serĉis restojn de estintaj ĝesamideanoj kaj formis el ili rondonton, kiu kunvenas ĉiudusemajne kaj ekzercas precipe en esperanta interparolado. Jen estas nomoj de tiuj revivuloj: geedzoj Ĉejka kun filo Mirek, s-ino Flašarová, kuracistedzino, Greinecker, instruisto, f-ino Holibková, direktorino de infanvartejo, Hrabal, fervojinspektoro, Chvatik, ĝardenisto, geedzoj Krčmář, presejestro, f-ino Vaňková. S-ro Hrabal akceptis la taskon prepari kaj gvidi programojn de kunvenoj.

**Ervěnice.** — Ministroj kaj oficistoj, gvidataj de lokomotivestro Ladislav Kopecký, lernas kaj propagandas Esperanton.

**Hradec Králové.** — 29. VIII. publika parolado de sviso Dro A. Bauer pri Svislando kun filmoprezentado, kiun vorte akompanis s-ino Bauer. Tradukis Vitek, organizis la loka EK, aŭskultis 300 p. Jam antaŭan tagon la 200 sidlokoj estis venditaj. — Kelkaj kursoj komenculaj kaj perfektigaj estas preparataj, por eksterurbanaj eĉ kursoj perletera. — Studento de la gimnazio starigis ekspozicion en ekspozicia kesto de sia lernejo. Multa intereso pri ĝi, eĉ la profesoro ne ŝparas atenton kaj laŭdon. — 16. IX. forlasis la EK ĝia sekretario, instruisto Vitek, por entrepreni pluan prelegvojaĝon al nordaj landoj. Bonan

sukceson! Almenaŭ tian, kian rikoltis la antaŭaj 90 prelegoj en Svedio. — La loka E-presejo Oma pretigas poŝkalendareton por e-istoj. Baldaŭ vi povos mendii ĝin ĉe la loka EK. — La programo por la ĉiuvendredaj klubkunvenoj en kafejo Národní estas fiksita ĝis 19. XII. — Orientbohema radiostacio en Hradec Králové elsendas nun E-programon ĉiumarde je la 21.45, ondlongo 238 metroj, daŭro 15 minutoj.

**Chomutov.** — Rudolf Tůma, helpata de Gruntorád, de samideanoj el Kundratice kaj el Hora sv. Šebastiána, sukcesis vekii intereson pri nia lingvo en Chomutov. Ili intencas fondi lokan grupon.

**Jablonec n. N.** — 4. VII. publika parolado de s-ino Alamo pri Svedio kun lumbildoj. Tradukis Vitek. La brile sukcesinta entrepreno estis organizita ne nur de la loka klubo, sed ankaŭ de la oficiala distrikta ŪRO.

**Karlovy Vary.** — E-klubo luis propran klubejon en la strato Bělehradská n-ro 3, proksime de la distrikta juĝejo. Regulaj kunvenoj okazas ĉiuĵaŭde inter 19—21 horo. TJO-anoj (junularo) havas apartan kunvenon ĉiun lundon de la 19-a horo. — Dum la banejĉefsezono vizitis niajn kunvenojn kiel gastoj jenaj gesamideanoj: Milada Poláková, Jablonec n. N., Růžena Mastná kaj Marie Hirschová el Brno, Lída Malá, Pardubice, Frant. Patera, Cheb, Josef Patera, Frant. Lázně, ing. B. Guttmann, Teplice-Šanov, Dobroslav Zeman kaj prof. dr. Hugo Jokl el Tábor, Josef Němec, Praha, František Bárta, Žilina, dr. Karel Hoenig, Veselí n. Luž. Aparte menciinda estas ĝojiga vizito de sveda samideano Maria Persson el Malmö, kiu restis ĉi tie preskaŭ tutan monaton kiel gastino de nia klubano Fr. Mílek. — Belajn diapozitivojn, propagandantajn Esperanton, projekcias ĉe ĉiuj filmprezentadoj lokaj kinejoj.

**Lázně Bohdaneč.** — El raporto pri agado de nia malnova amikino Ant. Grosmanová povas lerni niaj pioniroj, kiel oni povas labori eĉ estante sola en malgranda loko. Sian esperantan bibliotekon, enhavantan famajn verkojn de nia literaturo, la Enciklopedion de Esperanto, Originalan Verkaron de Zamenhof, Bibliografion de Internacia lingvo ktp., sume proksimume 200 volumojn, lokigis s-ino Grosmanová en vendejo, pri kiu ŝi disponas kaj emetis sursbrilon „Esperantská klubovna“. De Loka Nacia Komitato ŝi ricevis permeson uzi la lokan disaŭdigon. La 22-an de junio ŝi komencis, sonigis nian himnon kaj alparolis la lokan publikon en tiu malgranda, sed ĉarma banloko. S-ino Grosmanová vizitis la lokan klerigan konsilantaron, lernejojn, entreprenojn lokajn, disdonis niajn propagandilojn (ĉion je sia propra kosto) kaj petis moralan subtenon. Loka kantista koruso estis petita prezenti la kanton „Poem“ de Fibich en esperanta traduko. S-ino Grosmanová scias labori lerte kaj ne laciĝas. Nun ŝi instruas nian lingvon al du skoltinoj, estas kontenta pri siaj sukcesoj kaj daŭrigas la klopodojn. Krome ni devas danki tiun samideaninon pri iniciato en grava afero de tutŝtata signifo, pri kies rezulto ni aŭdos espereble baldaŭ.

**Nový Bohumin.** — La 8an de julio estis fondita Esperanto-klubo. Ĉeestis 18 personoj, el kiuj 11 aliĝis al la klubo. Elektitaj: prezidanto Alfons Kermel, vicprezidanto Ad. Trombala, sekretario Fr. Kocur, kasisto Pavel Trombik. Kunvenoj ĉiumarde en hotelo Avion.

**Nové Zámky.** — Kurso por 40 p. gvidita de dr. Gajdoš.

**Ostrava.** — Kurso por komencantoj, pri kiu ni ĝis nun ne raportis, estis malfermita pasintan novembron kun 24 p. Instruis Chaloupka en Lidový dům, Na Kamenci, ĉiusabate je la 19-a Ĉe-metode. — Esperantista rondeto en Slezská Ostrava havis ĵarkunvenon en Lidový dům na Kamenci la 12-an de aprilo. La invitilo tre trafe rekomendis propagandon de la Sokol-kongreso kaj po-individuan varbadon. — En O. Kunčičky la 7-an de septembro kunveno de lokaj esp-istoj, dum kiu anoncis Josef Hanzelka, ke estis aprobita statuto de la loka Esperanto-klubo. Fonda ĝenerala kunveno kaj komenco de E-kurso kun malgranda ekspozicio 5-an de oktobro. Ejo estis disponigita en domo de komunista partio, kie okazos regulaj kunvenoj ĉiun vendredon je la 19-a horo. — En O.-Zábřeh la 30-an de marto fondkunveno de nova Societo de esperantistoj „Komenský“; 45 membroj, prezid. Kubala. La fondon antaŭiris tritaĝa publika ekspozicio kaj memorfesto pri Komenský kun ĉefi- kaj interlingva programo de kantoj, deklamado kaj muziko; 160 p. Regulaj kunvenoj ĉiun 4an sabaton en Zábřeh, Družstvo, strato Chalupníkova 8. Meznombro ĉeestas 35 p. Loka

propagando per surstrata kesto ĉe la kunvenejoj kaj per afiŝado en magazenaĵoj montrufenestroj.

**Pacov.** — Kunvenis abiturientoj de komerca akademio kaj komerca lernejo kaj fondis Esperantistan klubon. Prezidanto estis elektita Fr. X. Papež, sekretario Jan Kokeš. Pri la fonda kunveno raportas „Práce“ (Tábor-eldono) el 4. IX. 1947. La raporto estas ĉefartikolo sur la Tábor-kolono kaj havas tri emfazajn titolojn: „Kunlaboro kun esperantistoj de la tuta mondo“, „Kultura Pacov venas kun Esperantista klubo“, „Ataka junularo komprenis signifon de unueca mondlingvo“. La tre impresa artikolo raportas, ke bona konsilanto al esperantistoj en Pacov estos eksĵurnalisto, nuna librovendisto en la urbo P. Pláček, kiu antaŭ multaj jaroj kulturis Esperanton kiel unu el la pioniroj. Li estis membro de E. K. en Praha, kiam estis ĝiaj prezidanto mag. konsilisto V. Kraus kaj sekretario Dr. Kamarýt. — Ni legis la artikolon kortuŝate kaj salutas la malnovan pioniron fajre kaj la novajn esperplene. Sukceson, amikoj!

**Podmokly.** — La 24-an de septembro s-ano Chmel kunvenigis la partoprenintojn de printempa kurso por diskuti la eblecon de nova kurso por komencantoj, kaj de plua organiza laboro. La vigan diskuton subtenis ĉefe ges-anoj Růžička per sia entuziasmo. Ĉeestis gasto el Praha, s-ano Echtner, kiu al la novuloj adresis mallongan supervidon de la interlingva demando. — 2. X. malfermo de kurso en urba legejo. 18 p., instruas Chmel, ĉiuĵaŭde je la 19a. Post favorplena alvoka artikolo publikigis ĉiumarde ĵurnalo Mladá fronta, regiona eldono, kurson de E., redaktas Chmel.

**Prostějov.** — S-ino A. Alamo parolis la 10-an de junio en urba teatro komplete plena. Antaŭan tagon dum gimnastika prezento de studentoj ŝi alparolis la ĉeestantaron (10.000 homojn) per mikrofono svedlingve kaj esperantlingve, tradukata ĉeflingven. La alparolo estis akceptita kun granda ovacio.

**Pržno kaj Ratiboř.** — En tiuj du montaraj vilaĝetoj parolis sukcese pri Svedio s-ino A. Alamo, la 11-an de junio en Pržno, la 12-an de junio en Ratiboř. En loka preĝejo salutis la parolantinojn kaj la ĉeestantaron la pastro de Ĉefaj fratoj Janeba. Ĉeestis proksimume 400 personoj, ĉe kiuj vekis nia sveda amikino veran entuziasmon.

**Sabinov.** — Loka grupo de SES estis fondita; prez. s-o Pavol Mikula, direktoro de banko Tatra, sekretario s-o Karol Mikloš, profesoro. Kurso komencula de 17-a de aprilo, gvidita de Štefan Sninčák, pastro en Michalany.

**Šternberk.** — Distrikta kultura konsilantaro kun Esperantista rondeto en Šternberk aranĝis la 11-an de septembro en salonego de Ĉefa Junulara Asocio paroladon de regiona peranto Vlastimil Blažek el Olomouc pri la Berna kongreso. Klarigojn aldonis distrikta peranto Ant. Harna. La parolado signifis bonan propagandon por la preparata E-kurso en tiu ĉi urbo.

**Tábor.** — E. klubo komencis regulajn semajnajn kunvenojn en hotelo Znamenáček mardon la 9-an de sept. S-o J. Škorpil raportis pri la Berna kongreso, Dr. Z. Dvořák pri siaj impresoj el libertempo. — La klubo aperigis propagandajn glumarkojn 55×55 mm kun teksto „Esperanto — reĉ zítřka“. Liveras Jožka Škorpil, Tábor 235 aŭ nia Libroservo.

**Turč, Sv. Martin.** — Prelego de A. Alamo estis la 14-an de junio en advokata ĉambro, ĉeestis granda nombro de enloĝantoj. — La 15-an de junio oni malfermis Esperanto-ekspozicion en Slovaka nacia muzeo, kiu daŭris ĝis kongreso la 13-an de julio.

**Úpice.** — 6. V. publika prelego en urba domo, organizita de SČM (junulara ligo). Prelegis prof. Beneš el Trutnov, prez. de SOPV Trutnov (loka grupo de liberigitaj propolitikaj persekutitoj), kunkremento de E-rondeto de pastroj, arestitaj en Dachau, eminenta oratoro. Krome parolis Safránek el Trutnov. 50 p. — 17. V. katolika organizo aranĝis prelegon kun filmo pri Nederlando en granda salono de la gastejo Vacek, preskaŭ tute plena. Prelegis fratoj Filip. — Bonan propagandon faras kesteto de ŪRO ĉe la ĉefa strato.

**Ústí n. L.** — La 1-an de oktobro vizitis la lokan klubon gastoj el Podmokly kaj Praha. S-ano Echtner parolis pri la kongreso en Bern. Lingvo-ekzerca ludo, praktikata dum preskaŭ ĉiu kunveno, finis la agrablan kuneston.

**Valaŝké Meziříčí.** — La 10-an de junio parolado de s-ino A. Alamo pri Svedio. Raporton pri tio sendis la distrikta inspektoro de bibliotekoj, kiu tre laŭdis la aranĝon, la oratorinon kaj ankaŭ la tradukinton Kvita, kaj bedaŭris, ke pro aranĝo en ne tre taŭga tempo la ĉeestintaro ne estis multa. Ni tre ŝatas ricevi raportojn de oficialuloj, kiuj diras, ke estas farita bona propagando por E. kaj ke ilia (oficiala) institucio, tie ĉi la Distrikta Kleriga Konsilantaro, intencas aranĝi aŭtune kurson de E. **Vratimov.** — Miroslav Mojžišek kolektis grupon de 20 samideanoj en tiu loko kaj preparas fondon de klubo.

## NI LEGIS

„Inter ĉefoj mia hejm“ estas titolita artikolo de Janinka van Oers el Rotterdam en Heroldo (1. VII.). Ŝi travivis kelkajn semajnojn en familio de s-o L. J. Svoboda en Plzeň. Ŝi traveturis plurajn regionojn de nia lando kaj jene resumas siajn impresojn: „Jes, laboremo estas la plej granda virto de ĉeĥoslovaka popolo. Kaj samtempe la ĉefoj estas tre gastamaj. Ilia spirito estas akceptema por ĉio bela; ili estas muzikemaj kaj religiaj.“ Estas agrable legi pri sia nacio laŭdajn vortojn. Ĝi estas ankaŭ embarase, ĉar ĉiu fido ligas al pli intensa plenumado de devoj. La citaĵo estu pardonita pro bezono premi manon de la vizitintino, ĉar efektive ŝia bona volo meritas esti akcentita kaj salutita. Bonaj homoj estimu sin reciproke!

**Esperanto kaj USSR.** Diversajn faktojn kaj konjektojn pri sinteno de ruslanda registaro al nia movado redonas artikolo de D-ro A. Mildwurf en Heroldo (nroj 12—13). La redakcio aldonas al la artikolo rimarkon: „En majo atingis nin la unua Esperanto-letero postmilita el Sovetio. La letero estis stampita en Moskvo, ĝi ne estas cenzurita, kaj ĝi atingis nin ok tagojn post la dato de la ekspedita stampo. En pli poste alveninta poŝtkarto estis eĉ aludo pri Esperanto-grupo nun ekzistanta en sovetia ĉefurbo.“

**Malfermo de la 950-j. jubileo de s-ta Adalberto** en la katedralo de s-ta Vito en Praha estas bildo sur kovrilo de Espero Katolika (julio-aŭgusto), kiu enhavas artikolon pri tiu sanktulo „Apostolo de centra Eŭropo“ de Bořivoj Benetka. La artikolo meritas plenan laŭdon. En alia artikolo de tiu ĉi numero prof. Jan Filip priskribas ĉeĥoslovakon „Schola cantorum“ kaj ilustras ĝin per 3 bildoj de la knaboj-kantistoj. Krome enhavas tiu numero bildon de flago de s-o helpepiskopo Dro Eltschknor, kiu konate surhavas Esperanto-stelon. Niaj katolikaj amikoj akiras gravan meriton verkante kaj organizante sian gazeton tiamaniere.

**Universala ligo de infanoriĉaj familioj** estas fondata de la Flandra kaj Valona Ligoj de infanoriĉaj familioj. Oni proponas al ili uzon de Esperanto. Turnu Vin al Flandra Ligo de infanoriĉaj familioj, Troonstraat 125, Brusel, Belgio. (Espero katolika, jul.-aŭg.)

**En nederlanda revuo por spiritismo** „Spiritualistische Geloofsgemeenschap“ el junio-julio estas esperantlingva kolono „Leert Esperantol“.

**Pri monumento al Nekonataj Infanoj 1939—1945**, inaŭgurita en Praha, pentekoston 1947, raportas J. Mařík en Heroldo el 1-a julio.

**30-a Bulgara Esperanto-Kongreso** okazis en Plovdiv inter la 6-a kaj 9-a de septembro. Ni multe bedaŭris ne povante uzi la afablan inviton de la Kongresa Komitato kaj ni devis kontentigi per nura saluto, sendita al la kongresanoj. Ni esperas baldaŭ aŭdi, kiel pasis tiu jubilea kongreso de la viglaj bulgaraj amikoj. Aperis ĉe tiu okazo speciala poŝtmarko, montranta konturojn de Bulgario kun verda stelo en la mezo. Ni povas ĝin liveri al niaj legantoj po Kĉs 12.— afrankite.

### Saluton!

Plej bela donaco al via eksterlanda amiko.  
— Luksa broŝureto multkolora. Liveras por 15.— Kĉs nia Librovendejo.

## RICEVITAJ LIBROJ

**Pisemný kurs esperanta** od prof. Jana a Karla Filipů, pěkně litografovaný, v 10 sešitech po 8 stranách, je ukončen. Obsahuje mnoho seznamů slovíček (vždy podle abecedy, esperantsko-česky). Cvičení z jednoho sešitu je v následujícím přeloženo, aby si je mohl čtenář zkontrolovati. Zájemcům zašle první sešit na žádost na pohlednici Fr. Bühr v Praze XVIII, Bělohorská 187.

**Arboj de la arbaro kaj kampo** de Frank Booth. Kun ilustraĵoj de Edith R. Turlington. The Esperanto Publishing Co LTD, Rickmansworth, Herts, Anglio. 40 paĝoj, 15×12 cm, 1 ŝilingo 10 p. afrankite. — Tiu ĉi libreto priskribas simple kaj trafe arbojn en Anglio: Frakseno, platan-acero, faĝo, karpeno, ulmoj (ordinara, mont-ulmo, aliaj), kverko. Tre instruaj bildoj akompanas la tekston. Ĝi estas legaĵo ĉarma kaj instrua. La broŝuro estas varba presajaĵo de la eduka junul-movado por knaboj kaj knabinoj „La arbarama popolo“ (13 Ritherdon Road Upper Tooting, London, S. W. 17). Juĝante laŭ la broŝuro la agado ilia estas tre respektinda. En la teksto ni vidis sole unu eraron, sed tre riproĉindan. La arboj enspiras karbon-dioksidon, ne oksigenon, kiel asertas la libreto sur paĝo 7. Popularaj verkoj devas esti laŭ la materialo donata tre korektaj. La traduko de la verko estas bonega, la nomo de la tradukinto ne estas en la libreto trovebla, kvankam li meritas sinceran gratulon. Kĉs 20.— ĉe ni.

**Dr Ivo Lapena: Esperanto u deset lekcija.** Potpuna gramatika međunarodnoga jezika sa vježbama i rječnicom. Treće prošireno izdanje. Izdao: Savez esperantista hrvatske, Zagreb 1946. Paĝoj 128. Prezo 20 dinarog. — Tria eldono de lernolibro de la eminenta kroata pioniro de Esperanto kaj de aliaj progresemaj ideoj. Ni laŭdu precipe multajn tre bonajn ekzemplojn, donitajn en lia lernolibro. La unua leciono enhavas instruon pri verbo kaj la personaj pronomoj (sen imperativo, kiu venas en komenco de la dua leciono). Participoj estas en la oka leciono. Estas donitaj tie tre detalaj klarigoj kun bonaj ekzemploj kaj modeloj pri kunmetitaj verboformoj. La esperanta teksto estas post ĉiu propozicio sekvata de teksto kroata. Ili ambaŭ estas verkitaj tre konsciencie, ke la ambaŭ tekstoj estu efektive samsignifaj ankaŭ en detalo. La aŭtoro akcentas bezonon klarigi detale ankaŭ parton sintaksan. Ni citu por ekzemplo lecionon naŭan pri „Du akuzativoj“. En la fino de la libro estas tekstoj de la Bulonia Deklaracio, de la himno, Ho, mia kor!, La vojo kaj fine esperantlingve kiel „Aldono“ neoficialaj afiksoj, uzataj por teknikaj terminaroj (-esk, -oid, -oz, -iz, -it, retro-, cis-, -iv) kaj „La principo de neceso kaj sufico“. La tipografia arango estas tre plaĉa. Ni gratulas al samideanoj kroataj, ke ili posedas lernolibron tiom bonan.

**Diversaj aŭtoroj: Novaj Esperanto-historietoj.** Aabyhoj. Dansk Esperanto-Forlag (Ingemannsvej 9). 72 paĝoj, 16×21 cm. La prezo 3 d. kr. — La libro enhavas 70 mallongajn „historietojn“, mi dirus anekdotojn, rakontatajn en simplega stilo, en lingvo senerara laŭ gramatiko kaj laŭ sintakso. La kompilinto L. Friis proponas ĝin al studon-doĉoj por parola ekzercado kaj al novaj esperantistoj kiel facilajn legaĵojn. La anekdotoj estas ekstreme malnovaj, oni povas diri, ke pro ne unu el tiuj ĉi antikvaĵoj prapatrino Eva donis vangofrapon al Adamo. La anekdotoj estas rakontataj multvorte. Versimile la novaj esperantistoj enuos uzante tiun ĉi libron por akiri spertecon en legado. Kial ni supozas, ke aliĝas al Esperanto sole homoj, kiuj neniam ion valoran legis, homoj, kiuj ne posedas necesan kvanton de scio literatura kaj de respektiva gusto kaj kapableco taksu la valoron de presitaj tekstoj? Mi ekzemple spertis, ke Eterna bukedo altiris al nia movado homon, kies fideleco al ni estas multe pli firma ol de tiuj, kiuj kapablas sen enuo tralegi tiajn ĉi antologiojn. Kial uzi laboron de tre bona scienco de la lingvo por verkadi, tradukadi aŭ retradukadi tiajn senvalorajn kaj seninteresajn anekdotojn? Kial pretendi, ke nia publiko posedas tiom malaltan nivelon kulturan? La redaktinto kaj eldoninto pardonu mian sincerecon! Ilia scio de la lingvo kaj ilia intenco estas tre bonaj. Mi scias, ke legolibroj instruaj por fremdaj lingvoj ofte havas similan nivelon laŭ vidmaniero de literaturamanto. Sed tie ĝi estas pli facile pardonebla, ĉar lerni fremdan lingvon estas multe pli malfacile ol lerni Esperanton. Tial ni ne imitu tion, kio ne estas imitinda kaj prezentu al niaj komencantoj efektivan literaturon en korekta kaj facila lingvol

**Tutmonda adresaro de la esperantistoj.** 128 pĝ, 15×21 cm. Aperis sub aŭspicioj de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (kort. konsil. Hugo Steiner), Wien I, Hofburg, Reichskanzlertrakt. Prezo 13-foja eksterl. leterafranko aŭ 13 rpk. — Jen adresoj de 7935 esperantistoj el landoj plej foraj (Kvinslando, Nova Sud-Gvalio t. e. Nova Suda Kimrujo, Kenjo, Burma ktp.) kaj plej etaj (eĉ Andorra estas inter ili). Interesa pruvo, en kiuj anguloj de la mondo oni scias nian lingvon, sed restas la demando, ĉu tiuj esperantistoj konsentos respondi al la atendebla atako de la korespondemuloj.

**Ĉiujn esperantajn librojn,** ankaŭ kompletajn bibliotekojn, aĉetas Librovendejo de EAĈSR. Sendu proponojn!

**Nova esperantlingva invito al Sokol-kongreso** en Praha 1948 aperis dum tiuj ĉi tagoj. Postulu ĝin ĉe Sletová kancelář, Praha III, Tyršův dům, kaj sendu ĝin al viaj amikoj.

## SLOVNÍK

K celému nákladu dnešního čísla přikládáme prvních 16 stránek slovníku česko-esperantského od R. Hromady. Celý slovník bude mít nejméně 7 archů, t. j. 112 stránek, a naši předplatitelé jej budou dostávat s každým číslem pokud si to budou přát a toto svoje přání projeví zasláním snížené ceny 15.— Kčs složenkou, rovněž přiloženou k tomuto číslu. Stránky slovníkové nebudou totiž zahrnuty do rozsahu časopisu a Svazu vydáváním slovníčku vznikající výlohy, jež nemůže krýt jinak než očekávaným příplatkem 15.— Kčs.

Vydávání slovníčku jako přílohy časopisu jeví se nám v nynější době jako jediná možná cesta, jak opatřit našim členům tuto pomůcku, dnes tak potřebnou a stále tolik žádanou. Budeme se snažit, aby tiskárna sázela rychleji, aby celý slovníček byl v rukou předplatitelů co nejdříve. V každém případě budou jej však mít naši přátelé dříve, než by tomu bylo, kdybychom musili dále prodělavati cestu, nutnou k vydání slovníku jako samostatné knihy.

Přes malý rozsah bude slovníček velmi obsažný, jak ukazují první stránky. Vynechána jsou všechna slova mezinárodní, jestliže jejich kmenová forma se neliší od tvaru užívaného v češtině (advokato, astronomo, bronzo, cedro a p.), pokud ovšem k jejich zařazení nebylo důvodů jiných. Místa tak získaného bylo využito pro slova potřebnější. Slovníček je vybrán z rukopisu slovníku velkého, k jehož vydání zatím potřebné částky 260.000 Kčs nemáme.

Ve smyslu usnesení poslední výborové schůze Svazu činíme výzvu k našim členům, aby hojným upisováním podílů (100.— Kčs, 200.— Kčs atd., jež budou vráceny) umožnili nám pořízení separátních otisků slovníčku pro potřebu našich kursistů a nových esperantistů.

Všechnu korespondenci slovníčku se týkající (kritiky, rady, přání), řiďte na adresu Svazu Praha XIX, Uralské náměstí 9.

**Skribu vian kompletan adreson,** korespondante kun ni! Kaj skribu ĝin ankaŭ sur la leteron mem, ĉar koverto estas forĵetata. Tiun peton ni direktas ankaŭ al niaj grupoj, kiuj ne forgesu en ĉiu sia letero noti adreson, laŭ kiu ili deziras respondon.

**Uralské náměstí 9** en Praha XIX estas adreso, al kiu direktu ĉiujn leterojn. Estas oficejo de entrepreno, en kiu laboras multjara kunlaboranto s-o Slavík. Li disponiĝis tiun adreson al la Asocio, sed ni ne devas malbonuzi tiun afablecon. Preterlasu personaĵn vizitojn en Uralské náměstí, ĉar s-o Slavík ne havas la eblecon ilin akcepti. Se vi deziras persone trakti kun iu funkciulo Asocia, bonvolu lin serĉi laŭ adreso, publikigita en n-ro 4 de nia revuo.

## ESPERANTISTA VIVO

**Mortis** s-o Vojtěch Matouš, komercisto, multjara membro de la E. K. en České Budějovice. Entombigo okazis la 22-an de aŭgusto 1947 en tombejo Sankta Otília. Honorigata estu rememor pri li!

## NOVA LISTO DE NIA LIBROSERVO

	Prezo Afranko	
	Kĉs	Kĉs
Papini, Historio de Kristo broŝ.		
574 pĝ. 13×20 cm	90.—	6.—
Deveno kaj historio de Esperanto.		
32 pĝ. 13×21 cm	6.—	1.20
Fibich, Poem. Muziknotoj por kanto kaj piano. Kun traduko en Esperanto, angla kaj franca l. 6 pĝ 23×30 cm	18.—	—.—
Afiŝetoj sur kartono. Verda stelo kaj surskribo »Esperanto«.		
Lasta provizo de la artistaj afiŝoj antaŭmilitaj. 21×29 cm	5.—	—60
10 ekz.	40.—	6.—
Al unu adreso ni povas liveri maksimume 50 ekz.	180.—	15.—
Ladaj tabuloj kun verda stelo kaj surskribo »Esperanto-informo« uzeblaj ankaŭ kiel stacidomaj tabuloj. Sildo taŭga por klubejoj kaj ĉiu esperanta aktivulo,		
29×42 cm	100.—	—.—
Glumarkoj kvarangulaj 100 ekz.	35.—	1.20
Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof	1.60	—.—
10 ekz.	10.—	1.20

### Prezkorektoj:

Lernolibro J. Šupichová Kĉs 28.—, afr. Kĉs 2.40.  
Heroldo de Esperanto Kĉs 165.—.

## UEA

Laŭ la interkonsento, farita kun la ĝisnuna peranto s-o Šustr, la administradon de UEA en nia lando prenas sur sin Esperanto-Asocio.

Por paĝi la kotizon de UEA uzu do pagilon de nia Asocio n-ro 9602.

La kotizoj por 1948 estas akceptataj jam nun. Ili estas:

MA (membro kun jarlibro k. gazeto) 125 Kĉs.  
MJ (membro kun jarlibro) 50 Kĉs.



**Vysokoškolská extense o esperantu.** Lektorát esperanta na Vysoké škole speciálních nauk v Praze uspořádá ve venkovských městech v době od 1. října 1947 do 30. dubna 1948 vysokoškolskou extensi o esperantu, jež bude záležití buď v propagační české přednášce pro nejširší veřejnost aneb v 3 až 6 hod. semináři odborných esperantských přednášek jen pro esperantisty: a) o dějinách myšlenky jazyka mezinárodního, vývoji esperanta od r. 1887 do r. 1947, esp. literaturfe původní i přeložené, dějinách esper. hnutí mezinárodního i domácího, aneb b) o zajímavostech esperantské mluvnice (fonetika, člen, tvorba a skládání slov, užívání afixů, ig, iĝ, zvrtné sloveso, odvozená příslovce, přechodníky, složené časy a j.) a esperantské skladby. Blíže informace sdělí: Dr. Aug. Pitlík, Praha II, Křemencová 21.

## Čtěte!

Snažíme se novou organizací práce zvládnout úkoly Svazu tak, abychom napříště vyhověli přesně a včas všem vašim přáním. Je nás málo a práce stále přibývá. Nemáme placené síly, která by se jí mohla věnovat celý den. Nemáme ani vlastních kancelářských místností. Vše, co nám píšete a co od nás žádáte, musíme zpracovat po večerech a nedělích, jak se jen dá. Pomozte nám. Máme k vám několik proseb, jejichž splnění jest pro vás maličkovitostí a nám práci velmi usnadní.

1. Veškerou korespondenci, ať již se týká čehokoliv, adresujte na naši adresu: Praha XIX, Uralské náměstí 9.

2. Pište čitelně své jméno a úplnou adresu, zejména na složenkách. Adresa na obálce nestačí. Každý dopis nechtě má přesnou adresu, na kterou má být dána odpověď. To se týká také klubů.

3. Přejete-li si několik různých věcí, napište o každé na zvláštní list papíru a pošlete vše v jedné obálce. Stačí nejstručnější popis záležitosti a váš podpis s adresou.

Roztřídíte podle možností tyto záležitosti:

a) Ideové a organizační náměty a dotazy, zejména ty, o nichž — pro jejich závažnost — bude jednat výbor Svazu.

b) Zprávy o vaší činnosti (pro Lokaj informoj nebo Kroniko).

c) Jiné redakční záležitosti našeho časopisu (články, překlady úkolů a pod.).

d) Hlášení nových členů (dvojmo), jejich platů, objednávky našeho časopisu a jiné administrativní záležitosti našeho časopisu.

e) Objednávky knih, jakož i ostatních předmětů, které inseruje naše Libroservo k dodání ze skladu.

f) Objednávky zahraničních časopisů.

g) Objednávky zahraničních knih, které pro vás musíme teprve ve světě sehnat.

h) Ostatní.

4. Na účet u Poštovní spořitelny čís. 12371 (text: Svaz esperantistů ČSR, účet knihkupectví, Praha) platte pouze za knihy, i cizí, propagační předměty a tiskopisy a cizí časopisy. Též za slovníky.

Na účet 9.602 (text: Svaz esperantistů ČSR, Praha) platte příspěvky (Svazu i UEA), předplatné „Esperantisty“, zkameny kotizo, dary a j. podle vyzvání.

Příspěvek UEA (dříve IEL) platte pouze složeným lístkem Svazu, č. 9602.

5. Neodesílejte peníze dříve, dokud na složenku (bezplatně) neuvědíte přesně za co platíte. Poznamenejte to tam i tehdy, píšete-li současně dopis. Jestliže objednávejte platem, poznamenejte, že jde o objednávku, která má být teprve expedována. Budete-li platit příspěvky

nebo předplatné na příští rok již v tomto roce, uveďte letopočet.

6. Základní členský příspěvek Svazu jest až na další Kčs 70.— za kalendářní rok. Časopis obdrží členové úplně zdarma. Neodkládejte placení příspěvků. Nemůžeme zaručit, že během roku budeme moci dodat dosud vyšlá bezplatná čísla.

Studenti a vojáci mohou platit snížený příspěvek Kčs 40.— za kalendářní rok. (Časopis dostanou zdarma.)

Rodinní členové, t. j. ti, u nichž v rodině jest již člen Svazu, zaplativší základní příspěvek, mohou platit snížený příspěvek Kčs 20.— za kalendářní rok. (Časopis nedostávají.)

Každý klub — jako odbočka Svazu — jest povinen přihlásit do Svazu všechny své členy a může pak za ně uhradit po Kčs 55.—. Studentské a rodinné příspěvky členů klubu jsou beze změny. Kluby stanoví obvykle své příspěvky tak, aby již zahrnovaly též příspěvek Svazu. Proto se doporučuje, aby členové klubů platili nikoliv Svazu přímo, nýbrž prostřednictvím klubů. Příspěvek pražského klubu (již včetně příspěvku Svazu) jest Kčs 100.— a platte jej na účet č. 9401 (text: Klub esperantistů v Praze, Praha II).

Členství Svazu obsahuje i kolektivní členství UEA (t. j. bez časopisu Esperanto a bez ročenky — pouze Servokuponoj). Svaz odvádí z došlých příspěvků příslušnou část UEA (nyní 5.— Kčs). Poskytuje-li ještě slevu klubu, nestačí krýt ani náklad časopisu. Nepožadujte proto slevy, můžete-li se bez ní obejít.

Dobročinností se meze nekladou. Poukážete-li nám vyšší částku než činí příspěvek a neuvedete-li výslovně její účel, připišeme přebytek s díky k dobrému tiskovému fondu.

Předplatné časopisu za 10 čísel činí nyní Kčs 60.—. Jednotlivé číslo Kčs 7.—. Objednáte-li předplatné svému zahraničnímu příteli, můžete nám poslat pouze Kčs 50.— za 10 čísel.

Doufáme, že touto spoluprací dosáhneme vaší spokojenosti, která bude i naší radostí. Rádi přijmeme pak vaši reklamaci, jestli snad některé vaše dřívější přání zůstalo bez vyřízení, a věříme, že v budoucnu se tak nestane.

TJO, Tutmonda Junulara Organizo kaj ĝia organo La Juna Vivo estas en nia respubliko reprezentata de s-o František Mašek, Karlovy Vary, Tř. krále Jiřího 17. Al li senpere sin bonvolu turni ĉiuj interesuloj. Ni transdonis al li ricevitajn pagojn por La Juna Vivo, kies jarabono estas nun Kčs 37.—.

Viziti la Sokol-kongreson venontjare deziras nederlanda instruisto kun edzino. Li serĉas tiucele amikon, se eble por reciproka vizito kun gastamo. Skribu al adreso: A. Verschoof, Kwartellaa 2, Vlaardingon, Nederlando.

**Hledá se v Praze zručná korespondentka,**  
znalá esperanta a těsnopisu, na několik hodin  
týdně za plat. Nabídky na Svaz.





# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

## Dojmy švýcarského esperantisty z Československa

Švýcarský spisovatel Dr. A. Baur konal u nás v srpnu a září 1947 řadu esperantských přednášek, o nichž referujeme v esperantské části listu. Své dojmy z Československa zaznamenal v řadě článků. Předkládáme překlad jeho fejetonu z „Neue Berner Zeitung“ z 21. září 1947.

Neexistuje lepší způsob jak přijít v cizí zemi do spojení s domácími lidmi, než navštívit esperantské kluby příslušné země. Učinil jsem v Československu na příklad pokus a výsledek předčil všechna očekávání. Řekl jsem si ovšem, že host nemá přicházeti s prázdnými rukama, a navrhl jsem proto před počátkem cesty českým esperantistům uspořádati u nich přednášky o Švýcarsku. Tento návrh našel radostný ohlas a z 11 měst přišla pozvání.

Cesta neproběhla zcela bez trampot, jelikož jsme musili ujetí 1200 km a projeli jsme všemi kouty Čech a Moravy. Způsob, jakým jsme byli všude přijati, dal nám však zapomenouti na všechny námahy. Češi se vyznačují příkladnou pohostinností, a nedají ničemu chyběti, aby své návštěvníky hýčkali a poctili. V některých místech byli jsme soukromě ubytováni a často jsme byli zváni k jídlu; bylo pro nás někdy téměř zahanbuující, když jsme museli viděti, jak lidé obětovali své příděly, aby nás mohli náležitě pohostit; moje paní vystihla totiž zrakem, vyvíčeným ve válečném hospodářství, že příděly jsou dosti přísně dodržovány a zvláště v masovém sektoru, jak se tam pěkně říká, nejsou vydávány přiděly příliš veliké. Ale žádný český hostitel byl by nedal něco z toho kdy ucítit.

Češi jsou národ, který při prvním setkání činí spíše dojem zdržlivosti. Útrapy, jimiž museli za okupace projít, nezůstaly bez vlivu na jejich národní povahu. Lidé jsou tam vážní a nasmějí se příliš. Chybí jim však též jinak spontánnost jihozemců, neboť, jak sami ironicky říkají, pijí příliš mnoho vodnatého piva a příliš málo ohnivého vína. Nejsou vlastně nepodobní nám německy mluvícím Švýcarům; máme s Čechy společnou onu vytrvalost a vážnost, která nás odlišuje od jiných lehce žijících národů. Má-li však člověk příležitost Čechy blíže poznati, zví brzo, že jsou velmi laskaví a ochotní, takže se člověk rychle cítí spojen upřímným přátelstvím. S mnoha lid-

mi jsem se v krátké době důvěrně seznámil a rád bych se s nimi opět setkal.

V různých městech byli jsme městskými úřady na radnici oficiálně přijati, pozdraveni proslovem, prováděni radnicí a musili na konec zapsati svá jména do zlaté knihy města. Bylo tím zdůrazněno, jak velmi si v Československu Švýcarska váží a jak jsou rádi, když zahraniční hosté si hodlají osobně učiniti obraz o stavu věci v Československu.

Mé přednášky byly povšechně dobře propagovány a v některých menších městech zdravil mě téměř v každé výkladní skříni plakát, zvučí »na přednášku dra Baura z Bernu o Švýcarsku«. V Prostějově jsem se také po prvé seznámil s druhem reklamy, která nám je úplně neznámá. Zatím co jsem ještě v ranním polospánku ležel v posteli, vnímal jsem z ulice českou přednášku z tlapačů, ze které jsem náhle zaslechl slovo Švýcarsko a pak své jméno. Jak jsem si potom dal vysvětliti, jedná se o městskou rozhlasovou službu. Na všech náměstích jsou umístěny tlapače, do kterých se mluví z radnice. Tak se podávají různá úřední hlášení a placené reklamy, je to tedy moderní způsob dřívějšího úředního vyvolávání. Nechtěl bych však tento systém doporučovati k napodobení, neboť představme si jen tento dotěrný hluk z úřední moci, kterému nelze uniknouti.

Obyvatelstvo projevovalo o přednášky živý zájem všude. Sály byly vždy dobře obsazeny, třebaž byly ještě prázdniny a třebaž soustava tlumočených přednášek je pro publikum (a pro řečníka) poněkud namáhavá. Poněvadž přednášky byly určeny pro širší kruhy, musily býti mé esperantské přednášky vždy překládány věta po větě do češtiny. Mluvil jsem o švýcarském lidovém právu, o obecní autonomii, federalismu, našich jazykových poměrech a vysvětloval zvláštnost švýcarské neutrality. Nato jsem ukázal několik filmů turistické povahy. V některých místech navázaly pak »hodiny dotazů«, které byly pro obě strany velmi poučné. Je zajímavé, že byly kladeny méně otázky politické než ony o všeobecných životních podmínkách u nás.

Byly dotazy, je-li u nás také přidělová soustava, co vydělá dělník a kolik úředník, jak je

vybudováno školství, jaké máme organizace mládeže, proč vystoupili švýcarští studenti ze Světového svazu studentstva, proč nemají ženy hlasovací právo, jak se jmenuje prezident Švýcarska. Způsob našeho spolkového předsednictví byl shledáván velmi zvláštní. V jedněch novinách byl referát o přednášce nadepsán »Země bez presidenta«. Celkem byl projevován nikoliv pouze velký zájem o Švýcarsko, nýbrž upřímné sympatie; mohl jsem zjistiti, že na tomto pozitivním postoji Československa k naší zemi má velikou zásluhu vysilač Beromünster se svým rozhlasovým komentátorem prof. von Salisem. Prof. von Salis je nejnámější a nejoblíbenější

Švýcar v Československu a nebylo jediného místa, kde by mi nebylo řečeno, jak horlivě bylo nasloucháno jeho věcným a správným komentářům k situaci — rozumějme, s nasazením života, neboť poslech zahraničních vysilačů byl stihán nejpřísnějšími tresty.

Pohlížím-li dnes zpět na svoji cestu, tu se ve mně probouzejí vzpomínky na nesčetné družné hodiny, které jsme v kruhu českých přátel strávili a během kterých jsem získal průhledy a porozumění pro životní podmínky českého národa, a doufám, že se i mně podařilo tradiční sympatie Čechoslováků k Švýcarsku ještě trochu posílit.

Přeložil Jiří Kořínek.

## Esperanto kaj lingvistiko

Ni kun plezuro publikigas artikolon, ricevitan de eminenta fakulo pri interlingvistiko, kiun li sendis al ni laŭ nia peto post apero de la artikolo „Ridindaj ludemuloj“. Ni konsentas kun liaj konsideroj kaj ĝojas pro tio sincere.

Multaj esperantistoj malŝatas la lingvistikon, aŭ almenaŭ al ili ne plaĉas, se la lingvistiko sin okupas pri Esperanto. Ĝis certa grado tio estas komprenebla, ĉar la vorto lingvistiko vekas memorojn pri la Delegacio kaj Ido, pri reformproponoj kaj lingvaj disputoj, pri malpaco kaj konfuzo. Tamen eraras tiuj, kiuj atendas nur malagrablajojn, aŭ eĉ danĝerojn de la lingvistika okupiĝo pri Esperanto. La lingvistiko estas precipe konstata scienco. La lingvisto, kiu sin okupas pri la lingvo franca, volas nur ĝisfunde pristudi la esencon kaj evoluon de tiu lingvo, li esploras la historiajn kaj psikologiajn motivojn de la ŝanĝoj, pristudas la individuajn elementojn en la lingvo-uzo, k. t. p. Lia celo ne estas perfektigi la lingvon, sed nur perfekte koni kaj kompreni ĝin. Estas vere, ke kelkfoje la lingvistiko forlasas la teorion kaj rekte konsilas reformojn, sed tion ĝi faras nur kiam temas pri la ĝepatra lingvo, kaj eĉ tiam ĝi ne intencas ŝanĝi la lingvon mem, sed nur proponas pli simplajn ortografiajn regulojn aŭ pledas por konservi la lingvan purecon atakante nenecesajn neologismojn kaj protestante kontraŭ lingvaj barbarismoj, kiuj minacas ĝeneraligi. Neniu lingvisto serioze pensus pri la ideo reformi sian propran lingvon per enkonduko de nova deklinacia sistemo aŭ per simpligo de la konjugacio. Des malpli li riskus fari tian proponon pri la lingvo de alia popolo.

Esperanto ne plu estas teoria projekto, sed ekzistanta lingvo kun relative granda disvastigo. La lingvisto, kiu okupas sin pri ĝi, devas respekti la faktojn, same kiel li devas fari tion studante alian lingvon. Tio tamen ne signifas, ke li ne rajtas kritike prijuĝi la lingvon. Esperanto estas helplingvo, kaj pro tio ĝia ĉefa eco devas esti facila lernebleco por plej multaj popoloj. Necese tamen estas, ke la facileco ne malhelpu la uzeblecon.

Neniu povas malpermesi, ke oni science esploru ĉu Esperanto atingis maksimumajn uzeblon kaj facilon. Kaj same kiel la lingvisto (kaj ĉiu

alia) rajtas kompari la lingvojn rusan kaj francan el kiu ajn vidpunkto, same li rajtas kompari Esperanton kun Volapük aŭ Occidental. Neniel estas riproĉinde, se ankaŭ esperantistoj partoprenas al tia kompara esploro, kiu ja havas karakteron pure teorian. Alie status la afero, se iu esperantisto, konstatinte malperfektaĵojn, korrektus ilin laŭ sia propra koncepto kaj uzus aŭ propagandus la tiel reformitan lingvon sub la nomo Esperanto. Nur tiam oni povus kaj devus prave protesti, ĉar Esperanto estas la komuna posedaĵo de ĉiuj esperantistoj, kaj neniu unuopulo rajtas enkonduki kontraŭfundamentajn ŝanĝojn, eĉ ne, se tiuj ŝanĝoj estus gravaj plibonigoj. Kiu opinias Esperanton ne sufiĉe perfektan, povas aliĝi al sistemo pli perfekta, kaj se tia sistemo ne ekzistas, li povas krei ĝin. Tiel agante li certe ne estas riproĉinda, kvankam estas tre dubinde, ĉu li kondukas saĝe. Esperanto ja montris ĝin tre taŭga, kaj krome ĝi posedas la grandan avantaĝon, ke neniu el ĝiaj rivaloj eĉ nur iomete povas konkuri kun ĝi rilate disvastigon. Multaj el la lingvistoj, kiuj ĝis nun interesiĝis pri la problemo de lingvo konstruita, samopinias pri tio, ke pri la definitiva sukceso aŭ malsukceso de iu lingvo ne decidis la grado de ĝia perfekteco. Multe pli gravaj estas aliaj faktoroj: jam atingitaj sukcesoj, disvastigo, efika propagando k. t. p.

Zamenhof mem estis konvinkita, ke Esperanto ne estas perfekta. Sed tio ne signifas, ke nia lingvo devas timi la komparon kun modernaj projektoj. Mi detale esploris la ĉefajn planlingvojn kaj mia konkludo estis, ke Ido, Occidental kaj Novial certe ne estas pli bonaj ol Esperanto.

Estas evidente, ke la lingvistiko neniel povas malutili al Esperanto kaj ĝia movado, se ĝi okupas sin sole teorie kaj konstate pri la lingvo. Eĉ male: el objektiva scienca esploro pri la fakta lingvo-uzo povas rezulti nur profitoj por nia movado.

Ke ne ĉiuj lingvistoj volas akcepti Esperanton en ĝia nuna formo, tio tute ne gravas, kondiĉe, ke ili ne tuŝu nian lingvon klopodante enkonduki reformojn. Ke ili provas konstrui novan lingvon, pli konforman al iliaj konceptoj, pro tio ni ne rajtas indigniĝi. Ankaŭ Zamenhof publik-

igis Esperanton en tempo, kiam alia helplingvo faris grandajn progresojn. Ni povas sincere bedaŭri, ke multaj scienculoj ankoraŭ ne volas akcepti Esperanton, sed ni ne koleru tial, ke ili serĉas alian solvon. Ju pli da lingvistoj sin okupas pri la helplingva problemo, des pli bone, ĉar ilia aktiveco pruvas, ke ankaŭ en sciencaj rondoĵ oni komencas interesiĝi pri la problemoj,

kaj la nura fakto, ke la lingvistiko ne plu staras skeptike kontraŭ la ebleco de universala helplingvo, jam povas efiki, ke ankaŭ la ceteraj instruituloj pli ol ĝis nun atentos ne nur la problemon, sed ankaŭ la solvon genian, kiun Zamenhof proponis.

Dr. W. J. A. Manders,  
Boenerstraat 7, Venlo.

## NI LEGIS

**Pri kompreno de demokrateco dum diskuto en la Berna kongreso** ni legas en Internacia Kulturo (sept.-okt.) konsiderojn tre pripensindajn. La aŭtoro Dro Ivo Lapenna kun multo estis malkontenta kaj ni plene konsentas kun li. La diskuto pri rezolucio, kondamnanta naziistajn kaj faŝistajn krimojn kaj alvokanta esperantistojn kaj Esperanto-organizaĵojn batali kontraŭ restaĵoj kaj novaj fajrujoj de faŝismo, proponita de ok naciaj asocioj (Jugoslava, Bulgara, Rumana, Pola, Aŭstria, Ĉeĥoslovaka, Hungara, Palestina), represita en „Esperanto“ sur paĝo 132, finis per malakcepto de la rezolucio. La diskuto vidigis la timeman demokratecon de multaj gvidantaj esperantistoj same kiel ekzemple la dirmaniero de la kongreso, ke preskaŭ la tuta Zamenhof-familio „pereis“, aŭ ke „oni“ mortigis ĝin. Neniu el la parolantoj volis diri, ke estis la germanoj, kiuj murdis Zamenhofojn kaj multajn aliajn judojn, polojn, rusojn, jugoslavojn, ĉeĥojn kaj aliajn. Kial kaŝi tion? Jes, multaj inter tiuj murdantoj estis naziistoj, sed murdis ankaŭ germanaj ne-naziistoj. Kial kaŝi tion parolante al esperantistoj kaj proklamante sin batalanto por pli bonaj interhomaj rilatoj? Kial timi diri, ke la lasta milito estis atakmilito? Ni citu dron Lapenna laŭvorte:

„Kontraŭ la honestaj, demokrataj germanaj esperantistoj, aktive kontraŭbatalintaj la naziismon, ni nenion volas diri. Kontraŭe, ni konsideras ilin niaj ĝesamideanoj. Sed ni ne forgesas kaj ni ne volas forgesi, ke inter la germanaj esperantistoj troviĝis granda nombro da fidelaj adeptoj de Hitler; ke en Jugoslavio, Pollando, Francio kaj en aliaj landoj sufiĉe granda nombro estis eĉ membroj de Gestapo. Ni pozitive scias, ke 2000 jugoslavaj geesperantistoj pereis kiel viktimoj de la nazifaŝismo, sed ni treege dubas, ke inter la 5000 vivantaj geesperantistoj en Germanio (tioma estas ilia nombro laŭ diroj de s-ro Sayers) neniu estis membro de la Hitlera krima, buĉista kaj rabista partio. S-ro Sayers kaj la aliaj advokatoj de la sole „vera demokratio“ de „esperantista toleremo“ kaj abstrakta amo bonvolu bone noti kaj memori: la demokrata esperantistaro volonte kunlaboros kun ĉiuj demokrataj, kontraŭhitleraj geesperantistoj, viktimoj de la naziismo. Sed ĝi neniam kunlaboros kun iu ajn esperantisto, kiu estis aŭ estas adepto de nazifaŝismo. Sen kompromiso kaj sen diskuto! Kaj koncerne la esperantistan toleremon kaj amon ni diras al la sama sinjoro Sayers kaj al liaj sekvantoj: nenia toleremo, nenia kompatado por la nazifaŝistaj krimuloj, ĉar ami la homon signifas malami lian buĉiston. Ni estas konvinkitaj, ke ankaŭ ĉiu honesta germana esperantisto aprobas nian starpunkton same tiel, kiel ĝin aprobis la aŭstria demokrata esperantistaro.“

**Pri kio oni ne parolis en la Berna kongreso**, resumas dro I. Lapenna en la citita numero de Internacia Kulturo: Dum la luta kongreso ni aŭdis eĉ ne unu vorton pri la gigantaj penoj de la esperantistaro en la okupitaj landoj vivteni nian lingvon dum la militaj jaroj. Same oni eĉ ne menciis la beleĝajn sukcesojn, atingitajn de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj (ĉiutagaĵaj radio-disaŭdigoj en Esperanto), aŭ de la aŭstriaĵaj esperantistoj (enkonduko de Esperanto en lernejojn), aŭ de la hungaraj esperantistoj (lernejoj, Literatura Mondo), aŭ de la balkanaj esperantistoj (Internacia Kulturo, komunaj konferencoj, amasa kolektiva korespondado). La faktoj, ke Heroldo, la sola duonmonata gazeto, apenaŭ povas regule aperadi pro nesufiĉa nombro de abonatoj; ke Literatura Mondo — la fiero de ĉiu serioza esperantisto — havas eĉ ne tiom da abonatoj, ke ĝi povus kovri la preselspezojn, kaj similaj aliaj faktoj ne multe turmentis la plimulton de

kongresanoj, kiuj prefere bone amuziĝis partoprenante dudekon da plej diversaj ekskursoj kaj elspezante por tiu celo amason da svisaj frankoj. Mi vetus, ke inter 1400 kongresanoj ne troviĝis pli ol 400 abonatoj de Heroldo kaj pli ol 100 abonatoj de Literatura Mondo. Kaj tamen Heroldo kaj Literatura Mondo aperas kaj aperos plue. Subtenataj grandparte de tiuj, kiuj ne havis sufiĉan monon por partopreni la ekskursan Bernan kongreson. — Ni plene aprobas tiun ĉi manieron konsideri de nia eminenta kolego. Kaj ni ĝojas pro lia ĝusta takso de akiritaj rezultoj.

**Pri stranguloj en la Berna kongreso** plendas dro Lapenna en la sama raporto. Tion ni ne trovas tro danĝera por nia movado. Ĉiuj progresemaj kaj revoluciaj celadoj havis kaj havas siajn strangulojn kaj ili ne malutilis al la noblaj celoj kaj idealoj. Ekz. ankaŭ komunismo havis kaj havas tiajn unuopulojn, kiel ilin havis kristanismo. Pli malagrabla ŝajnas al ni konstato, ke ekz. „en la dua laborkunsido kongresa, kies temo estis propagando, partoprenis en la diskuto amaso da personoj, el kiuj sufiĉe granda nombro ne regis kontentige la lingvon, sed preskaŭ ĉiu volis diri ion pri si mem“. Ni konas tiajn diskutojn, sed ĝi ankaŭ ne estas specialeco de esperantistaj kunvenoj. Tio estas ĝenerala homa eraro, eble eco de kelkaj individuoj (sufiĉe multaj), kiu malfaciligas agadon de kolektivoj ĉiuspecaj. Ni estu indulgaj al samideanoj, same kiel ni estas indulgaj al anoj aligrupaj. Sed tamen ni klopodu, ke nivelo de esperantistaj kunvenoj altiĝadu. Eble ni nin tamen iam reciproke konvinkos pri tio. Ni bezonus efektivan diskuton pri propagando, diskuton dokumentitan per multaj spertoj donataj sen plibeligo, ke ni povu prijuĝi, ĉu la ĝisnunaj metodoj, uzataj dum kvardek jaroj, estas taŭgaj por la nova tempo. Ni ekzemple ne scias, ĉu dise hazarda instruado de Esperanto en lernejoj al ĝejnuloj havas sencon, se mankas ebleco instrui samtempe lernejan junularon en pluraj aliaj landoj. Ni bezonus diskuton pri ebleco entrepreni agadon pri Interŝtata akordo. Ni bezonus diskuton pri starigo de Komerca adresaro. Diskuton pri resonado de esperantlingvaj disaŭdigoj, el kiu rezultus, kiaj sciigoj estas pleje aŭskultataj pro la enhavo mem. Oni povus daŭrigi tian liston. Pri ĉio tia povus diskuti kongresa laborkunveno. Tiam diskuton devus prepari la UEA-estraro.

**Esperanto en la lernejoj!** Labori al tiu nepra celo volas intense La Juna Vivo, West-Grafdijk, Nederlando. Ĝia numero de julio-aŭgusto 1947 estas la unua de ĝia deka jaro kaj samtempe provo de nova kunlaborado kun la Internacia Instruista Kunlaboro. LJV aperos en du eldonoj, kompleta — por 47 Kĉs jare — kaj kiel 8-paĝa organo por infanoj — por 19 Kĉs jare. Abonojn akceptas František Mašek, Karlovy Vary, Třída krále Jiřího 17.

**Artikolon de dro Bohumil Erben: Sociala asekuro en Ĉeĥoslovaka respubliko** tradukis William Hajduček kaj ĝin publikigis la pariza Esperantista Laboristo en sia nro 5/1947. Tamen aspektas iom fanfarone, se oni parolas tie pri plej perfekta sociala asekuro kaj pri aliaj „plejoj“. Ni evitus tion parolante al eksterlando.

**Pri la grandaj Esperanto-steloj**, kiuj vekas la atenton de ĉiu alvenanto al la ĉefa (Wilson-) stacio de Praha, publikigas la angla C. T. C. Gazette leteron de A. Weiner. Li parolas pri la avantaĝo, kiun havas la vojaĝantaj esperantistoj, sed kiun ne spertas angle parolantaj turistoj. (El „The British Esperantist“.)

**Sinceran voĉon de aŭstra amiko** ni legas en 5/1947 nro de Aŭstria Esperanto-Revuo. Julius Pieke pledas tie por vasta enkonduko de Esperanto en la najbaraj landoj

Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Aŭstrio kaj diras i. a.: „Mi naskiĝis en Bohemujo kaj estante jam maljuna, mi antaŭ mia forpaso el ĉi tiu vivo volonte ankoraŭfoje vizitus la hejmlandon de miaj mortintaj gepatroj. Sed pro la senekzemplaj krimoj de germanaj nazianoj en la Ĉeĥoslovaka respubliko mi volus eviti la aplikadon de la germana lingvo. Ne pro timo antaŭ la ĉeĥoj, sed pro honto kaj honesto... Post monstabiliĝo ne nur bonstataj aŭstriaĵoj, sed certe ankaŭ germanaj ŝtatanoj sentos la bezonon denove viziti la mondfamajn banlokojn de Ĉeĥoslovakio. Inter ili estos certe multaj, kiuj volos esprimi sian sinceran abomenon pri la dum milita besta germana naciismo ne nur per vortoj, sed ankaŭ per la simbola faro: ekzemple eviti la aplikadon de germana lingvo kaj uzi anstataŭ ĝi ankaŭ Esperanton kondiĉe, ke ĝi estos jam sufiĉe disvastigita en ĉi tiuj banlokoj kaj en la turismo ĝenerale... La samo validas, kiam ĉeĥoj, hungaroj, jugoslavoj kaj alilandanoj vizitos denove la famajn refreŝigajn lokojn de Aŭstrio. Por ilin ne devigi uzi la de ili malŝatan germanan lingvon, ankaŭ aŭstriaĵaj turismaj instancoj devus okupiĝi pri eldono de necesaj gvidlibroj...“

Ni klopodas en tiu direkto kaj samideanon Pieke ni invitas sincere, ke li jam nun vizitu nian landon, kiu estas ankaŭ lando lia. Li estos bonvena.

**Pri bonaj spertoj de la aŭstraj partoprenantoj de la Junulara Festivalo en Praha** parolas la Internacia Esp. Servo de Aŭstrio en sia nro 2/1947.

**Pri „Blua fulmo“**, speciala rapidaĵo inter Praha kaj Bratislava, skribas La Interligilo en sia 5—6/1947 nro. Estas traduko de „eto“ el Národní osvobození.

**Sennaciulo** (oktobro) en sia raporto pri SAT-kongreso en Aarhus sciigas pri principa akcepto de Ĉeĥoslovakio por okazigo de SAT-kongreso en 1949. — Ni raportas pri la kongreso en ĉeflingva parto de nia revuo. Ni bedaŭras, ke ni trovis en tiu numero nenium indikon pri la nombro de ĉeestantoj.

**Literatura mondo** nro 9—10 enpresis tradukon de du ĉapitroj el Notoj sub la pendumilo de Julius Fučík. La traduko de L. Urban estas tre bona. Jen ekzemplo de laboro por nia afero! El la sama numero ni citu rakonton de Matwiejczuk „La spiono“ pro la tre impresa sed simpla stilo. Klopodi al majstreco per simpleco estas plej malfacile. Al tre instrua studaĵo de Waringhien pri Rimbaud ni diru nian miron pri nekutima skribo de nomoj: Li volas skribi Rimbaldo, Galtiero, Viljono anstataŭ Rimbaud, Gautier, Villon. Ni tion ne preferas, ĉar la prononcon naĵlingvan oni povas redoni preskaŭ ĉiam sole proksimume, do neprecize. Tial ŝajnas al ni la ĝisnuna grafismo pli praktika kaj pli utila.

**Esperanto en USSR.** Ni legas en Internacia Kulturo (oktobro): Pluraj sovetaĵ esperantistoj demandas nin kiamaniere estas abonata Internacia Kulturo en USSR. Ni respondas: Jara abonotizo kosta 25 rublojn. Necesas nur, ke per letero aŭ poŝtkarto oni sciigu al ni sian precizan adreson kaj sian deziron aboni la gazeton. Oni povas rekompenci per ruslingvaj libroj kaj gazetoj aŭ alimaniere laŭ interkonsento.

**Verda voĉo de Doksy**, amuza gazeto de Somera Esperanto-Lernejo en Doksy, kiun ni anoncis sur paĝo 82, aperis en oktobro, bele multobligata, 4 paĝoj sur verda papero, redaktata de s-o Ant. Slanina. Ĝi sciigas oficiale, ke malgraŭ la arbara brulego la Somera Esperanto-Lernejo en Doksy daŭrigos sian ekzistadon kaj funkciadon. En la kajero estas komenco de (ĉeflingvaj) „Kelkaj ĉapitroj pri Esperanto“, verkataj de Dro A. Pitlik.

**Unua postmilita kongreso itala** okazis en unuaj tagoj de aŭgusto en Torino, en palaco Carignano. Ĉeestis pli ol 150 p., inter ili kelkaj alilandanoj. (Esperanto, okt.)

**Social-demokratia partio de Germanio** en sia kongreso 29-an de junio ĝis 2-an de julio akceptis rezolucion favoran al Esperanto. La partio akcelos la enkondukon de Esperanto inter la laboristaro kaj ĝian uzadon en la internacia korespondado kun alilandaj laboristaj organizaĵoj. La partio rekomendas plivastigi la uzadon de Esperanto ĉe internaciaj laboristaj kaj sindikataj kongresoj. (Esperanto, okt.)

**Szalay Körlevél** — Szalay cirkulero estas 6-paĝa informilo de la eldonejo Szalay (Budapest VIII Esperanto u. 39), hungar- kaj Esperanto-lingva, informanta pri aktu-

alaĵoj de nia movado kaj pri ofertataj libroj. La aranĝo kaj la enhavo estas tre plaĉaj.

**La ombro de la dua milito jam malaperis** de sur la tero, kaj jen la nia movado iĝas iom post iom pli harmonia en la tuta mondo! Kvankam la situacio ne estas tute normaligita, oni jam povas konstati, ke en ĉiuj landoj renaskiĝas pli forta idealo pri neŭtrala internacilingvo, la ĝenerala apogo al Esperanto; kaj ni plengoje povis vidi la kunfandiĝon de UEA kaj IEL. — En ĉiuj sektoroj de la homa vivo oni vidas la efektiviĝon de la progreso: la industrio perfektigas, la komerco akiras novajn sistemojn pli praktikajn, la pedagogio prezentas pli efikajn metodojn por la instruado de lingvoj, sekvas la sciencoj vojon plenan de grandaj eltrovoj kaj inventoj. — Ni kontente legas tiujn vortojn optimismajn en Rio Esperantista (septembro 1947) kaj ĝojante pro ilia konvinkemo ni represas ilin kun aprobo kaj espero.

„Nova sento“ estas oficiala organo de „Uberlandia Esperanta Klubo“, monata, kvarpaĝa, verdokolore presita. Adreso: Rua Santos Dumont 350, Uberlandia, Estado de Minas Gerais, Brazilo. — El la julia numero de la unua jarkolekto ni citu artikolon „Basic English kaj Esperanto“, kiu asertas, ke en la brita parlamento la opozicio atakis decidon de la brita registaro, kiu aĉetis de Ogden lian adaptaĵon de la angla lingvo. La gazeto estas presata sen supersignoj uzante la h-kunmetaĵojn.

„Rio Esperantista“ estas oficiala organo de Asocio de Rio de Janeiro, monata, po 8 paĝoj, 24×33 cm, esperant- kaj portugallingva, imponas jam pro tio, ke ĝi estas organo de la loka klubo, eĉ se ĝi estas en urbo tiom granda. En la 5-a numero de la unua jarkolekto (aŭgusto 1947) ni trovas kelkajn ciferojn pri la Brazila eksporto. En jaro 1946 eksportis Brazilo 930,274.860 kilojn da kafo kaj 21,974.934 kilojn da sukero, 14,102.848 kilojn da kotonteksaĵoj. Adreso de la gazeto R. das Marrecas, 19-2 and., Rio de Janeiro. Ekzisto de tri gazetoj, aperantaj en Brazilo, pruvas vigecon de nia movado en tiu granda lando.

**De Monda Bonvol-servo en Ontario** ni ricevas regule ĉiun duan semajnon el Kanado cirkulerojn (Novaĵo-servo pri popol-movadoj) de Monda Bonvol-Servo en Ontario. En n-ro 9 de la 1-a de novembro ni legas raporton de simpatia organizaĵo Sociedad Fraternal Hutteriana en Primavera, Alto Paraguay. Oni parolas tie pri severa interna milito, kiu daŭris tiam (en septembro 1947) en Paragvaĵo dum kvin monatoj kaj duono kaj oni rakontas pri la diversaj abomenaĵoj, kiaj la militojn akompanas. Sed tamen la organizo daŭrigas la konstruadon de vilaĝo por militaj orfoj eŭropaj kaj siajn klopodojn venigi la infanojn al si. La Hutteranoj ŝajne prave kredas, ke la infanoj fartos pli bone en la militanta Paragvaĵo ol en la postmilita Eŭropo.

**Internacia TJO-kunveno 1948** okazos en Francujo aŭ Ĉeĥoslovakio, decidis la TJO-laborkunsido en Ipswich. (La Juna Vivo, oktobro 1947.)

**Pri eniĝo de germanoj en esperantistan organizon** malfermas diskuton en „Esperanto“ (novembro) Hans Jakob. Li konsilas, ke demokratiaj kontraŭfaŝistaj germanaj esperantistoj faru ordon inter si malakceptante ĉiun estintan naziiston. Tiamaniere oni povus akceptadi germanajn esperantistojn inter nin. „Germanujo estas hodiaŭ vera batalkampoj prilingva. La Militistaj Registaroj ĉiel subtenas la instruadon de la propra lingvo. La angla lingvo videble pleje sukcesas pro faktoroj konataj. La franca lingvo sekvas nur duavice kaj la rusa serĉas ankaŭ sin penetri.“ — Ni pensas, ke la problemoj ne estas ankoraŭ urĝaj.

**Pri senpolvigilo** kaj ĝia funkciado skribas La Progreso (Amsterdam) en sia nro 10/1947 kaj aldonas klaran skizon. Senpolvigilo estas aparato de ordinara uzo. Ni lernu paroli pri ĝi kiel pri ĉiu alia ĉiutagaĵo.

**Iom da detektiveco.** S-ano J. Pavlacký, pri kiu ŝajnis al s-o EVT, ke li prezentis al Internacia Kulturo Schulhof-tradukon de Marinjo Magdon kiel sian propran, klarigis al ni tre fidinde, ke temas pri fuŝa publikigo en Internacia Kulturo. Li sendis al la redakcio la tradukon kopiitan el Legu kaj parolu kun biografieto de Bezruč. La redakcio ne publikigis la biografieton sed sole la poemon kaj s-on Pavlacký indikis kiel tradukinton. La malgrandajn ŝanĝojn en la teksto faris la redakcio propravole.

Ni publikigas tiun ĉi informon kun sincera ĝojo kaj petas samideanon Pavlacký, ke li ne koleru je ni. Li meritas dankon pro sia sukcesa tendenco publikigi el ĉefaj aŭtoroj.

**Bulgara poŝto eldonis poŝtmarkon kun esperanta teksto,** dediĉitan al 60-jara jubileo de internacia lingvo kaj al la 30-a kongreso de bulgaraj esperantistoj, kiu okazis en septembro nunjara en Plovdiv. Kompletan sumon, en-

spezitan por tiu ĉi poŝtmarko, ĉirkaŭ 3 milionojn kaj duonon da levoj, donacis la registaro de la Popola Respubliko Bulgara al la Bulgara Esperanto-Asocio. Okaze de la vizito de jugoslava delegacio al la 30-a kongreso de bulgaraj esperantistoj donis la registaro 200.000 levojn por faciligi la restadon de la gastoj. (Nia rimarko: Levoj 3,500.000 = Kĉs 450.000, Levoj 200.000 = Kĉs 25.000.) (La Suda Stelo, Zagreb, nov. 1947.)

## RICEVITAJ LIBROJ

**G. J. Degekamp: Esperanto 60-jara.** Skizo pri evoluo de la lingvo internacia. Eld. Libroservo F. L. E., Roelantstr. 4, Amsterdam W. 58 pĝ 15×24 cm. Prezo Hfl 1.30, kartonita Hfl 1.75, ĉe EAĈSR afrankite por Kĉs 27.— kaj 35.40. — Interesa kaj instrua studo pri evoluo de nia lingvo, kiel ĝi prezentiĝis en verkoj de post komenco de nia literaturo ĝis plej lasta tempo. Kiel ekzemplon de tiu evoluo, kiu ne malhelpas perfektan komprenon kaj ĝuon de bona literaturo, verkita en iu ajn epoko, ni trovas ĉi tie represon de „La neĝa blovado“ en traduko de A. Grabowski (el la jaro 1887) kaj fragmenton el „Cezaro“ en moderna traduko de Ivo Rotkvič. — Plej rekomendinda libreto por ĉiu serioza sekvanto de nia literaturo.

**Theo Thijssen, La nevenkebla ĝeno.** Momentoj de tualeta mizero. El nederlanda lingvo tradukis F. Faulhaber. Eldonis Asocio de Laboristaj Esperantistoj F. L. E., Roelantstraat 4, Amsterdam W. 320 pĝ 13×19 cm. Bindita. Prezo 4.90 Hfl. Ĉe EAĈSR 97 Kĉs afrankite. — Priskribo de malfacilaĵoj, kiujn al ni kaŭzas la vestaĵo, ĝia nesufiĉo aŭ manko ekde la infanaĝo. Pri tiu ŝajne banala temo sciis verki Thijssen 22 ĝuidajn ĉapitrojn, plenajn da vera vivo, elvokantajn jen ridon aŭ ridegon, jen kompaton. Kaj konstaton, kiel proksimaj ni estas unu al aliaj malgraŭ diverseco de la landoj kaj lingvoj, ĉar sperton absolute la saman havis infanoj ĉeĥoslovakaj kiel la nederlandaj knaboj Joop kaj Henk. Sole la vivo scias pentri bildojn tiel aŭtentikajn, neniam verkista fantazio.

Cito de kelkaj kritikindaĵoj en la dika volumo estas sole pruvo, kiel majstra estas la traduko. Ni trovis 5 preserarojn: grantiite (6), buzo (16), efektive (19), ŝonĝo (53), gojas (149), mankantajn akuzativon: kiaj kuzetoj kaj kuzinetoj ni renkontos (134) anst. kuzetojn..., troan: ni sentis nin akrobatojn (78). Anstataŭ: „aspekto kia vagono“ (136) ni dirus „kiel“. Ni ne trovis sufiĉan motivaĵon por kunligo de diversaj vortgrupoj per streketo, kiel: kia-mi, sperto-pri-vestoj, bulkoj-kun-sekaj-vinberoj, knabo-kun-kristnaska-ferio kaj eĉ pantranĉo-kun-io-sur-ĝi. Tio aperas ofte en la libro, sed ne tre ĝenas la leganton. Ni konsentus pri la streketoj sole (15): similetas ankaŭ-knabon. Unusolan lokon ni ne komprenis, kiam oni traktas pri pago por kudro (83): Ne homo! protestas la panjo. Jes homo, diras f-ino Volkamp.

Sed ni ripetas: Ni sentis plej grandan ĝuon legante la verkon, kiun ni povas sincere rekomendi.

**Agostinho da Silva, Vivo kaj Arto de Goya.** El la portugala tradukis Vergílio Mendes. Eldonis Portugala Eldona Rondo, Porto, kiel 2-an numeron de la kolekto „Enkonduko en la kulturon“. 24 pĝ 13×18 cm, kun 10 ilustr. Prezo 7 Kĉs, kompleta serio de 6 sinsekvaj n-roj 34 Kĉs ĉe EAĈSR. — Ni povas ripeti la laŭdon, esprimitan ĉe apero de unua numero de tiu ĉi kolekto de instruaj verkoj malgrandaj, sed ĉiam interesaj, pri temoj plej diversaj. En la nuna kajero ni trovas kelkajn sciindajn detalojn pri vivo kaj laboro de la hispana pentristo Goya, famiĝinta tra la mondo precipe per la ciklo pri teruraĵoj de la milito, per sia vestita kaj nuda Maja (Maja == hispanlingve „belulino“, ne propra nomo) kaj

per aliaj verkoj, el kiuj la plej famaj estas ĉi tie reproduktitaj. Konstatebla estas klopodo redoni laŭvorte la originalon kaj tial la lingvo fariĝas iuloke tro peza.

**Agostinho da Silva, Historio de Usono.** El la portugala tradukis Manuel de Freitas. 3-a numero de la supra kolekto. 28 pĝ. kun 2 ilustr. Eldonisto kaj prezo kiel supre. — Tre rekomendinda libreto. La aŭtoro sukcesis doni agrable legeblan historion pri tiu granda temo, kvankam la disponebla spaco estis malgranda. La tendenco estas tre akceptinda. Enestas kelkaj, nemultaj, strangaĵoj, precipe pri tempoformoj, kiujn ni ne aprobus. Ekz: „La prezidanto nomus siajn sekretariojn, havis la rajton malsankcii la leĝojn kaj estas respondeca...“ (14) kaj simile aliloke. Anstataŭ: „nutris rilatojn“ (10) ni dirus simple: „havis“. Sed ĉi ĉio estas sensignifaj makuletoj, kiuj ne forprenas valoron de la bona tuto.

V úhledné knížce „Čeští spisovatelé a veřejnost o junáctví“ (170 stran, 7.—8. číslo „Knižovny junáckého činovníka“, vydávané nakladatelstvem Junácké edice, Praha II, Štěpánská 61) praví spisovatel Jindřich Černý mimo jiné: „... Co přeji junáctví v nastávající dvoudlece? Především dobrou úrodu dobrých vedoucích... Dále pak pochopení ve všech místech ve státě, v zemích, okresech i obcích. Konečně junákům i skautkám, aby se naučili pomocnému mezinárodnímu jazyku esperantu, neboť je ze všech řečí nejsnazší a umožní jim styk s mládeží celého světa. Otevře jim daleké výhledy a poznají cizí bolesti i cizí radosti...“

## NOVAJ ONDOJ DE RADIO-PRAHA

Depost la 30-a de novembro (dimanĉo) Praha uzadas por la mallongonda dissendo la jenajn ondojn kaj horojn:

ĉiutage:  
 17.28—17.30 h. MET ondo 49.92 m, ŝtata himno.  
 (16.28—16.30 h. GMT) 1935 m  
 17.30—17.45 h. MET ondo 31.41 m, bulteno kaj muziko.  
 (16.30—16.45 h. GMT) 1935 m  
 23.00—23.15 h. MET ondo 49.92 m, komentario kaj in-  
 (22.00—22.15 h. GMT) forma bulteno aŭ  
 radiomuntaĵo.

La Esperanto-programoj per la stacio Praha I. (470 m) restas neŝanĝitaj:

Lunde kaj ĵaŭde je la 22.50—23.00 h. MET ondo 470.2 m.  
 (21.50—22.00 h. GMT)

**Mallongonda dissendo el Radio-Praha** envicigas ĉiun merkredon je la 23.00 horo 5-minutan „Verdan angulon“ kun informoj pri la Esperanto-movado. Funkciuloj sciigu la Radion-Praha (XII, Stalinova 12) pri ĉio, kio povas kaj devas esti disaŭdigata. La fremdlandaj aŭskultantoj sciigos tiamaniere plej rapide pri ĉio, kio estas preparata. La sciigon sendu al J. Mařík en Praha II, Krakovská 20.

**VERDA STACIO PRAHA.** Ni ricevis la informon, ke la ĉeĥoslovaka Radio metis en sian programon de la jaro 1948-a ĉiumonatan tridekminutan artoprogramon en Esperanto, laŭ la modelo de la antaŭmilita Verda stacio. La elsendoj de la Verda stacio okazos ĉiun unuan lundon en la monato de la 23.30—24 horo MET sur ondoj 269 m (60 KW stacio Praha II.), 325 m (100 KW nova stacio Morava). La unua elsendo la 5-an de januaro 1948. — La ĝisnunaj programoj restas senŝanĝe. Ili estas nun: ĉiutage 1. je la 17.30, ondo 49.92 m kaj 1935 m. 2. je la 23.—, ondo 49.92 m; lunde kaj ĵaŭde je la 22.50 sur ondo 470 m (Praha I.). La ĉeĥoslovakajn samideanojn ni petas disvastigadi la informojn pri ĉi tiuj Esperanto-elsendoj inter svaj korespondantoj eksterlandaj. — La redakciojn de la Esperanto-gazetoj ni petas represi.

### Esperantista poskalendaro 1948

bela eldonaĵo de Esperantista klubo en Hradec Králové. — Multe da interesa kaj utila enhavo, i. a. Komercista adresaro. Por Kĉs 32.40 liveras afrankite  
 Librovendejo de EAĈSR.

## INFORMOJ DE NIA LIBROSERVO

Nove haveblaj (iuj sole en kelkaj ekz.):

	Prezo Kĉs	Afranko Kĉs
Paul Fructier, Kompleta gramatiko kaj vortfarado en Esperanto. Kompletigis S. Grenkamp-Kornfeld (sole kelkaj ekz.). 200 pĝ 15×22 cm	65.—	4.—
Esperanta krestomatio. Eld. Nederl. Centra Komitato Esperantista 1947 (recenzo sekvos) 120 pĝ 13×19 cm	33.—	2.40
Ivan Sirjaev, Peko de Kain. 36 pĝ 11×15 cm	8.—	—60
Kantareto. Eld. Fr. Buhr 1929. 64 pĝ 14×17 cm	15.—	—60
J. Novák, J. A. Komenský. 28 pĝ 10×15 cm	2.50	—60
K. J. Erben, Bukedo. Iom difekt. ekz.	16.—	2.40

<b>Plena vortaro.</b> Tria represita eldono. Fundamenta verko, kiun devas havi ĉiu. Denove havebla. Antaŭmendu tuj ĉe ni kaj ni sinsekve ekspedos.	200.—	—
<b>Jubilea kalendaro 1948.</b> Eld. Esperantista klubo, Hradec Králové. Praktika poŝkalendaro. Vidu anoncon! Nepre havigu al vi!	30.—	2.40
<b>L. L. Zamenhof.</b> Brila broŝureto de J. Ŝupichová. Aperas en la serio »Kdo je?«. Bonega propagandilo. Tuj antaŭmendu! Ni liveros tuj post apero senprokraste.	6.—	—60

**Esperantobladet.** Norvega Esperantisto. Organo de Norvega Esperantista Ligo. Ni akceptas nun abonon por ĉi tiu bona revuo de niaj norvegaj amikoj. Sendu Kĉs 42.— por la jaro 1948 al poŝtĉeka konto nro 12.371 de EAĈSR.

## RICEVITAJ GAZETOJ (tria listo)

**Arbetar Esperantisten.** Laborista Esperantisto. Eldonas Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Barnhusgatan 8, Stockholm.

**Aŭstria Esperanto-Revuo.** Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado. Wien I, Neutorgasse 9.

**Bulletin de la Société Entomologique de Mulhouse.** Kun tekstoj en Esperanto. Eld.: 52, rue de Verdun, Mulhouse.

**Eta Heroldeto.** Red. Narcisa kaj Joe. Eld. Sukro, 2, Cambridge St., Willoughby, N. S. W., Aŭstralio. Multobl. Ĉesas aperi kun sia 57-a n-ro, daŭriĝo sub nomo:

**Sukro.** Lingvo-cirkulero, kies 2 numerojn ni ricevis.

**Grubesko.** Itallingva gazeto pri Esperanto. Eld. Milano-Parabiago, Via San Michele 21.

**Internacia Esperanto-Servo de Aŭstrio.** Eld. de Aŭstria Laborista Esperantistaro, Wien I, Neutorg. 9. Multobl.

**Jurnalisto.** Ĉina revuo, provizore dumonata. Poŝtkesto 115, Ĉengtu, Ĉinio.

**Klasbatalo.** Organo de sovetkomunista frakcio en SAT. Adm.: J. G. Leereveld, Prof. van Reeslaan 4, Blarikum, Nederlando. Multobligita.

## INFORMOJ

### Slovniĉek

Dalsiĉ 16 stránek slovníčku přiřkládáme i tentokráte k celému nákladu, ježto téměř všichni odběratelé zaslali příplatek 15 Kčs. Doufáme, že i ostatní zašlou. Příštích 16 stránek slovníku dostanou jen ti, kteří zasláním příplatku dali najevo, že si slovníček přeji. — Došlé objednávky na další výtisky slovníku jsme si poznamenali a vyřídíme, až bude celý slovník vytištěn, zbrožován a stanoven jeho cena (25—30 Kčs).

**Oprava:** Při slově **celek** opravte si: tut(aj)o (misto tu(aj)o).

**Dua regiona kunveno en Olomouc** okazos la 13—14-an de decembro 1947. Sabate aranĝos Esperantista societo en Olomouc amuzan vespereton kun programo kaj danco. Dimanĉe antaŭtagmeze okazos regiona kunveno, kie oni pridiskutos la faritan kaj farotan laboron. Ĉiuj samideanoj estas invititaj. La interesuloj estas petataj mendi la tranoktadon minimume kvin tagojn pli frue.

**Zamenhof-iesto en Radio-Bratislava.** Okaze de la 88-a datreveno de la naskiĝtago de nia Majstro disaŭdigos radio Bratislava dimanĉon la 14. XII. vespere je la 19,15 horo en la kadro de sia programo „Aktualajoj“ kvaronhoran Esperanto-programon. Ni petas samideanojn, ke ili aŭskultu tiun ĉi programon kaj skribu al la radiostacio.

**Du novaj poŝtkartoj.** Ni ekspedos en proksimaj tagoj: 1. Novan poŝtkarton kun bildo de Zamenhof. 2. Kristnaskan poŝtkarton. Desegnis Dolfa Bartoŝik en maniero de lignogravuro. — Prezo: 10 ekz. 12 Kčs afrankite. — Mendu tuj ĉe nia Libro-servo (Pŝp. konto 12.371) la plaĉajn poŝtkartojn de nia konata artisto.

**Propagando en kinoteatroj.** La Asocio pruntedonas senpage al siaj grupoj kaj membroj plaĉan diapozitivon por projekciado en kinoteatro. Estas unu el la tre efikaj manieroj de propagando. Por 20 Kčs ni prizorgos alskribon de adreso, de mallonga informo pri kurso aŭ simile. Post interkonsentiĝo kun loka kinoteatro skribu kaj vi rapide ricevos la diapozitivon. (5 diversaj specoj.)

**Novajn aliŝojn kaj glumarkojn** ni preparas. Ni esperas anonci en la venonta numero detalojn.

**Tutmondan adresaron,** aperintan en Wien, ni provizore ne povas prizorgi. Ne estas permesite sendi 13 respondkuponojn en letero. Se aperos alia pagoebleco, ni sciigos la prezon en Kčs.

**Laborista Esperantisto.** Organo de la Ligo de Laboristaj Esperantistoj F. L. E., Roelantstraat 4, Amsterdam W.

**La Interligilo.** Ofic. org. de ILEPTT, 46, rue Lamartine, Paris IX.

**La Rondo.** Ofic. org. de la Aŭstria Esperanto-Asocio. Red. F. R. Banham, 2, Banchory St., Essendon, W. 5, Victoria, Aŭstralio.

**Monda Bonvol-Servo.** Eld. duonmonate de Monda Bonvol-Eldonejo, 16 Dominion Boulev., Windsor, Ontario, Kanado. Multobligita.

**Nova Sento.** Of. org. de Uberlandia Esperanta Klubo kaj de Araguari Esperanta Klubo. Rua Santos Dumont 350, Caixa Postal 337, Uberlandia C. M., Estado de Minas Gerais, Brazilo.

**Renoviĝo.** Eldonata de Editorial Lumen. Jesus Amaya, Dir. Ap. 59, Mejiko.

**Rio Esperantista.** Ofic. org. de Asocio Esperantista Rio de Janeiro. R. das Marrecas, 19, 2-o andar., Rio de Janeiro.

**Semu konstante.** Org. de Esp. Soc. „Suda Kruco“, Eindhoven, Venkelstr. 15. Multobligita.



**Universala kongreso de Esperanto** (33-a) en la j. 1948 estos en Malmö (Svedio) la 31-an de julio ĝis la 7-an de aŭgusto. Kotizo ĝis 31. XII. 1947 20.—, ĝis 31. III. 1948 25.—, poste

30.— svedaj kronoj Edzo aŭ edzino de kongresano 10.—, 15.—, 20.—, junul(in)o ne pli ol 20-jara 8.—, 10.—, 15.— svedaj kronoj. Hotelĉambroj 11.—, 9.—, 7.— svedaj kronoj potage, ĉambroj ĉe privatuloj po 4.— svedaj kronoj, amasrestejo en lernejo po 2.— svedaj kronoj. — Aliĝiloj estas riceveblaj ĉe nia oficejo. Monon oni povas sendi per banko al A. B. Svenska Handelbanken Malmö konte de la Universala Kongreso de Esperanto en Malmö.

## ESPERANTISTA VIVO

**Mortis fidela batalinto por nia afero.** En Brno, Ĉeĥoslovakio, mortis la 7-an de septembro malnova Esperanto-pioniro Karlo Steyer. Li naskiĝis 31. V. 1886 en Brno, kie li estis dum komenco de la jarcento kunfondinto de la Esperanto-klubo. La mortinto foriris poste eksterlanden kaj dediĉis 42 jarojn de sia vivo al laboro por Esperanto. Li pasigis plejparton de tiu tempo en Germanio, kie li estis oficisto de Esperanto-eldonejo, poste eldonisto mem. Li kompilis vortaron, gvidis Esperanto-kursojn. — Fine li loĝis en Tabarz Th. Pro sia Esperanto-laboro li fariĝis viktimo de nazi-reĝimo. En malliberejo li grave ekmalanis kaj revenis post la milito en sian patrujon kun difektita sano. Li estis nun jam multajn monatojn katenita al lito kaj lastajn du monatojn li heroe pasigis en superhomaj suferoj. En mizera ĉambreto, flegata de bonkora maljunulino, li trovis solan ĝojon en vizitoj de lokaj samideanoj. Antaŭ la morto li mem fiere alfiksis verdstelan insignon sur sian morto-

## ESPERANTO V CIZINĚ

**Esperanto ve vědeckých publikacích.** Dr. Paul Neergaard, známá dánská autorita v rostlinné patologii, sepsal již několik prací ze svého oboru v esperantu a je velmi spokojen s jejich rozšířením. K poslednímu svému anglickému dílu *Alternaria and Stemphylium* přidal rozsáhlé esperantské resumé. Fytopatologická laboratoř v Kodani připojuje esperantské překladv ke všem svým výročním zprávám. Holandský slovník osvětlovacího názvosloví, vyšlý v Arnhemu, má rovněž esperantský překlad mimo anglický, francouzský a německý, ale je zajímavé, že jen do esperanta jsou přeloženy všechny výrazy. Při tom byly v anglických i francouzských převodech nalezeny vážné chyby, kdežto esperantský text je bezvadný. I Japonsko, kde se před válkou na mnoha místech snažili nahradit angličtinu esperantem, se znova hlásí. Časopis chemické společnosti Nippon Kagaku-Kai uveřejnil esperantské články profesora biochemie dr. F. Egami a profesora biologie dr. Y. Ooty, obou z nagojské university. Geofysický magazín, vydávaný meteorologickou observatoří v Tokiu,

veston. Sur lasta vojo lin adiaŭis lokaj esperantistoj kaj florkrono kun surskribo en kara lingvo ornamis lian ĉerkon. Honoro al lia nobla rememoro!

**RNDr. František J. Havelka**, sekcia konsilanto de la ministerio de komerco e. p., malnova esperantisto, mortis pro kormalsano 65-jara en malsanulejo de Teplice-Šanov. Dum siaj vojaĝoj tra Ruslando antaŭ la unua mondmilito li ofte uzadis Esperanton kaj ĉi tiun fakton li menciadis propaĝande dum siaj publikaj paroladoj pri Kaŭkazo kaj la tiama Ruslando. Dum la milito 1914—1918 li estis persekutata kaj arestita de aŭstria aŭtoritatoj. Lia intenco aranĝi en Teplice E-kurson ne efektiviĝis pro senintereso de la tiea publiko. O. S.

**Marie Hladilová**, instruistino en Kroměříž, nia membrino, mortis en septembro. Honoro al ŝia rememoro!

**Josef Slepíčka**, ĉefa oficisto de ĉs. fervojoj, prezidanto de E. Klubo en Vodňany, multjara kaj fidela kunlaboranto en nia klopodado, mortis la 12-an de novembro 1947 en aĝo 62 jaroj. Li apartenis al speco de modestaj persistaj laborantoj por idealo. Ne meritas esti forgesita.

**Julius Procházka**, lernejestro e. p. en Rajhrad (Benešova 82), ĝisvivis 70 jarojn. Fidela partiano de niaj celadoj estu salutita plej sincere.

**Božena Vlčková** en Kladno (Dubí, Stránská ul. 110) fariĝis en tiu ĉi jaro 60-jara. Ni salutas ŝin kiel kunlaborantinon ĉiam pretan helpi en ĉiu fako de nia multflanka klopodado. La virto, tre necesa por nia celado, estas la persistemo. Eminentia nia koleĝino posedas ĝin altgrade. Krom ĝi modestecon, krom ĝi scion, krom ĝi laboremon kaj multajn aliajn kvalitojn kaj kapablojn, kiujn ĉiujn ŝi dediĉas al nia laborado. Ni ripetu nian saluton kun deziro de sano kaj multaj jaroj ankoraŭ.

**Edziĝo.** Eva Hromadová, filino de Rudolf Hromada, edziniĝis en septembro kun Jaroslav Kulháněk, artskulptisto. La nova geedza paro akceptu niajn bondezirojn, la paro gepatra niajn salutojn.



**Změna adresy.** Dr. Tomáš Pumpr, vrch. odb. rada min. vnitra, Praha XIX, Verdunská 8.

**Samideanino Věra Tepláková!** Sendaĵo de brazila samideano por vi troviĝas ĉe s-o F. Arnošt, Prostějov, Stalínova 3, al kiu sendu vian adreson!

otiskl esperantský článek „O přílivu na pobřeží Fušiki v zátocce Tojama“, jež napsal T. Tagučí. (American Esperantist.)

**Debata o světě 1948** je název mezinárodní konference o politických, hospodářských a intelektuálních problémech současnosti, již svolali na letnici 1948 soukromí myslitelé a zájemci do Paříže. Jednání budou rozdělena mezi čtyři komise s těmito úkoly:

Komise politická pokusí se najít odpověď na otázky:

1. Lze dospět k synthese západního a východního chápání demokracie?

### ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO

Brila kolekto de tradukoj el nia literaturo. Impona volumo (466 pĝ 15×24 cm), riĉe ilustrita. Ne devas manki en biblioteko de ĉeĥoslovaka esperantisto. En speciale bela tola bindo denove havebla en komenco de decembro. — Prezo Kčs 280.— afrankite. Bela donaco.

2. Jsou možny světový parlament a světová vláda? Je nadstát uskutečnitelný nebo je to utopie?

Komise h o s p o d á ř s k á má se pokusití řešiti tyto otázky:

1. Co jest pro lid lepší: liberalismus nebo státem řízené hospodářství?

2. Který z národohospodářských systémů má nyní řídití hospodářství: kapitalismus, státní socialismus, theorie hojnosti?

Třetí komise, v ě d e c k á, pojedná o posledních vynálezech a prodiskutuje důsledky atomové bomby pro lidstvo.

Čtvrtá komise, i n t e l e k t u á l n í, pojedná mezi jiným o těchto otázkách:

1. Mají lidé právo na úplnou nezávislost bez státní kontroly pasové, celní, devisové atd., či mohou státy ve svém zájmu omezovatí tuto nezávislost svých občanů?

2. Mají časopisy a rozhlas býti nezávislé, státem kontrolované nebo státní?

3. K čemu vychovávají děti: pro individuum, pro rodinu, stát, národ, lidstvo?

Jednací řeči konference bude výhradně esperanto.

Konference je podnik vzniklý z iniciativy zcela soukromé a prominentů nebude na něm mnoho. Je to však skvělý doklad, jak lidová, v nejlepší slova smyslu, je touha dobratí se nějaké odpovědi na otázky, jež na nás náléhají stále bolestněji. Konference bude mítí účast opravdu mezinárodní, pokud ovšem státy budou vydávatí pasy svým příslušníkům. Debata na ní bude opravdová mezinárodní debata, neboť se povede esperantem. Adresa předsedy přípravného výboru: P. Petit, 34 rue de Chabrol, Paříž 10.

**Esperanto v americkém filmu.** V Praze jest právě promítán americký film Ch. Chaplina »Diktátor«. Chaplin, který hraje obě hlavní úlohy, v závěru filmu v důrazném projevu pronáší vášnivou obhajobu míru, demokracie a vzájemné snášenlivosti mezi národy. Jako by hovořil ze srdce esperantistů, kteří mají stejný cíl. Autor, režisér a hlavní postava filmu Charlie Chaplin při psaní scénáře myslil na nás a na esperanto. Ve scéně z ghetta, v němž žije pronásledovaná rasa, k níž patřil i dr. Zamenhof, vidíme na krámech esperantské nápisy: Papervendejo, Vestajoj malnovaj, Legomo, Terpomoj a pod. — Nezapomeňte shlédnout tento slavný film!

**První poválečný kongres dělnických esperantistů** (v celkovém pořadí 20.) konal se 2.-7. srpna v Dánsku v Aarhus. Pořádal ho »Všesvětový svaz beznárodní« (Sennacieca Asocio Tutmonda), který sdružuje socialisty všech odstínů a spojuje šíření esperanta s bojem o šíření socialismu. Nyní v něm převládá, podle jednání sjezdových soudě, tendence protiválečná. Roku 1949 bude tento sjezd v Československu.

**Jak škodí počínání occidentalistů** myšlenec mezinárodního jazyka, toho dokladem příkladným, ani prvním ani posledním, je článek duchaplného komentátora veřejných věcí Štěpána Engla ve Svobodném zítřku z 23. října: »Dovršení nadstavby Babylonské věže«: »Bořitelé babylonské věže, kteří měli úmysly nás spasit, provedli nám hroznou věc, svědčící přímo o biblické klatbě lidského pokolení, že k dosavadním řečem a nářečím připojili další tučet universálních jazyků s doporučením, abychom se jim v nejkrajší době naučili.« Ke komu pronikla propaĝanda occidentalistů, nutně získává takový dojem. Nemůže uvěřit v neodpovědnost jejich přehánění a nezná theorii esperantistů. My totiž nabízíme jazyk hotový a tak dokonalý, že se jim adekvátně tlumočí projev myslitelský i básnický stejně přesně, netvrdíme však, že je to nejdokonalejší možný umělý jazyk. Pečujeme o jeho vývoj a zlepšování analogickým způsobem, jako se vyvíjejí jazyky přirozené, a myslíme, že může býti všeobecně přijat nevnesením nějakých pomyslných autorit, nýbrž ponehánělym vnikáním do všech oborů lidské potřeby sdělovací. To jmenujeme praktickou aplikací esperanta. A odmítáme věřit v domněnku, že by o všeobecném zavedení umělého jazyka rozhodovaly podrobnosti jeho slovníku a mluvnic; je jistě zcela bezvýznamné pro jeho rozšíření, říká-li se v esperantu koni čevalo nebo v occidentalu caval (vyslov kaval). Je však přímo povázhlivé pro získání adeptů mezinárodního jazyka, dostávají-li esperantisté-začátečníci výzvy, aby zanechali »zastaralého« esperanta a věnovali se »modernímu« occidentalu. Vzniká tím u nich skepse o možnosti mezinárodního jazyka vůbec, jak je patrné z případu Štěpána Engla. Jistě se tím pronikání esperanta v kruhy stále širší a jeho jazykové zdokonalování nezastaví, ale pravděpodobně se zpomaluje. A to je škoda. Budiz k citovanému článku jen ještě poznamenáno, že esperantistům je zcela cizí myšlenka spasit svět. Zlepšiti ano, v to věříme, spasit někoho, to odmítáme. Jsme radikální empirikové.

**Redakcio informas.** Tiu ĉi numero havas sole 8 paĝojn, ĉar la 6-a havis 16paĝojn. La rubrikoj Kroniko enlanda kaj Lokaj informoj estos en la venonta numero. La funkcioj de la grupoj sendu al ni ĉion raportindan.

## Velký česko-esperantský slovník

Přípravy na jeho vydání neprestaly a věc bude uskutečněna, ukáže-li se možnost. Rukopis je připraven a prosíme znova všechny přátele, aby skládáním podílů po 100 Kčs (na účet našeho knihkupectví u psp. čís. 12.371) podepřeli tento podnik velké důležitosti. Lze složití i vícero podílů a upřímně k tomu zveme! — V době co možno krátké oznámíme výsledek této akce se všemi podrobnostmi.